

Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe.

**Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso
kaj la Ontologio de la socia esto;**

**Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la
ontologio de Lukaĉo.**

Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo

Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe

**Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso
kaj la Ontologio de la socia esto;
Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la
ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de
religio kaj kredo**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe.
Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso
kaj la Ontologio de la socia esto;
Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo.
Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo
Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2013
ISBN 978-2-918300-86-1

Tiun ĉi libron la tradukinto dediĉas al

Gerardo Hernández Nordelo,
Ramón Labañino Salazar,
Antonio Guerrero Rodríguez,
Fernando González Llort kaj
René González Sehwerert¹

-
- 1 *La Kvin Kubanoj – aŭ la Kuba Kvinopo* –, kiuj estis sin enŝovintaj en la teroristajn grupojn de Miamo, Usono, por neŭtraliigi ilin. La Kvin sukcesis malhelpi cent sepdek atencojn kontraŭ Kubo per tio, ke ili ĝustatempe alarmis la instancojn en Havano. La kuba registaro informis tiam la usonajn instancojn kaj, en junio 1998, delegacio de la FBI vojaĝis al Kubo, kie ĝi ricevis kompletan dokumentaron pri la agadoj de la ekstremistoj de Miamo.

Post konatiĝi kun la informoj kaj la nerefuteblaj pruvoj pri la kontraŭleĝaj kaj danĝeraj agadoj de tiuj grupoj, la FBI, anstataŭ agi kontraŭ tiuj krimuloj, arestigis la kvin informantojn, kiuj, riske de siaj vivoj, estis barintaj tiujn teroraĵojn. Ili estis en Miamo kondamnitaj al longaj jaroj de malliberejo, ekz-e Gerardo al pli ol duoble vivolonga malliberejo.

Pri tiu justicskandalo vidu en Esperanto Salim Lamrani (komp.): *La terorismo de Usono kontraŭ Kubo; La Kuba Kvinopo*. Esperantigoj el la hispana kaj la franca lingvoj de diversaj MAS-anoj, Monda Asembleo Socia (MAS), Embres-et-Castelmaure, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la ontologio de la socia esto

En la fina ĉapitro de la *Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj* Markso resumas sian juĝon pri Hegelo jene: „La ĉefa afero estas, ke la objekto de la konscio estas nenio alia ol la memkonscio aŭ ke la objekto estas nur la objektigita memkonscio, la memkonscio kiel objekto.” El tio sekvas: „La laboro, kiun Hegelo sole konas kaj agnoskas, estas la *abstrakte spirita*.”¹

Tio estas interpreto, kiu dum la plua evoluo de Markso ricevas mildigojn kaj modifojn, kiuj estas ja signifaj, sed kiuj ne estas reala kaj vera revoko. Kaj temas pri interpreto, kiu ĝuste en sia plej radikala formuliĝo ripetiĝis ĉe diversaj aŭtoroj kaj tendencoj de la marksisma tradicio. Ekzemple Georgo Lukaĉo havis la meriton, ke en sia fama monografio (*La juna Hegelo kaj la problemoj de la kapitalisma socio*¹) li emfazis la centrecon de la temoj bezono kaj laboro ĉe Hegelo: Dum la unua temo celas klare la biologian naturon de la homo, la dua celas la transformadon de la fizika naturo, kiu necesas por kontentigi la bezonojn. Kaj tamen, en la jaro 1967, do kvar jarojn antaŭ sia morto, Lukaĉo havis nenian dubon, ke „la objekto, la aĵo ekzistas ĉe Hegelo nur kiel eksteriĝo de la memkonscio”.² Sed restas mistere, kiel Hegelo, sole kun tiu emo je vizio – nur por citi la malfruan Lukaĉon – povis esti „filozofo kun forta kaj ampleksa senso pri la realo”, „kun tiom intensa malsato je vera realo, kiom eble post Aristotelo okazis ĉe nenia alia pensanto.”³

Analoge argumentas Ernst Bloch, kvankam el alia perspektivo. Unuflanke li emfazas „la altsignifan efikon” en la *Fenomenologio de la spirito*, „ke la pluevoluo de la memkonscio okazas per la konscio de la laboranta servisto”¹, per kio ni estas resenditaj al la temo *laboro* kaj implicate al la

1 *Karl Marx: Ökonomisch-philosophische Manuskripte, en: MEW, Ergänzungsband, Erster Teil*, Berlino, 1968, p. 575 kaj 574.

1 En la germana: *Der junge Hegel und die Probleme der kapitalistischen Gesellschaft*. -v1

2 *Georg Lukács: Vorwort zu: Geschichte und Klassenbewusstsein* [Georgo Lukaĉo: Antaŭparolo al: Historio kaj klaskonscio], en: *Werke* vol. 2, Darmstadt, 1968, p. 26.

3 *Georg Lukács: Zur Ontologie des gesellschaftlichen Seins* [Georgo Lukaĉo: Kontribuaĵo al la ontologio de la socia esto], en: *Werke*, vol. 13, Darmstadt, 1968, (en la sekvo: **Lukaĉo: Ontologio**), p. 483,

1 *Ernst Bloch: Subjekt – Objekt. Erläuterungen zu Hegel. Erweiterte Ausgabe*

bezonoj, kiujn ĝi devas kontentigi, t.e. ni estas denove resenditaj al la fizika naturo en ĝia komplekseco kaj samtempe ankaŭ al la biologia naturo de la homo. Aliflanke Bloch asertas, ke „la reatingo de la identeco de subjekto kaj objekto ĉe Hegelo – laŭ lia dialektiko ĝis la fino idealisma kaj eĉ ĉiam pli senmonda – estas pensata nur kiel kompleta repreno de la eksteriĝoj (objektoj entute) en la subjekton”.² Sed sen tiaj fendoj la interpreto de Hegelo, kiun en Italio produktis la skolo de Galvano Della Volpe kaj Lucio Colletti – prezentiĝas kiel groteska konsciismo³ (t.e. kiel redukto de la realo al objekto de konscio).

Dum Markso kaj eĉ pli la tradicio, kiu referencas lin, emfazis la absolutan originalecon de la nova mondpercepto kaj de la nova politika movado, ĉe la alia flanko ne nur la itala novidealismo, sed ankaŭ la plej diversaj pensofluo – speciale en la jaroj de la Malvarma Milito – strebis ŝirmi Hegelon kontraŭ ĉia kontakto kun la komunisma „materiismo”, kiu primokis kaj minacis la ideajn, spiritajn kaj religiajn valorojn de la Okcidento. Kaj el tiaj diversaj kaj eĉ kontraŭaj motivoj fine estiĝis la banalaĵo, kiu establis la interpretadon de Hegelo kiel konsciencismon aŭ panlogikan modelon. En radikale alia historia situacio estas nun jam tempo por trapensi la problemon sub novaj aspektoj.

Naturo kaj laboro ĉe Hegelo

Post la fundamentaj metodaj pensadoj de ĝenerala karaktero, kaj antaŭ ol komenciĝas la reala kaj vera traktado, oni devas unue konsciigi, ke la *Prelegoj pri la filozofio de la mondhistorio*¹ komenciĝas per la emfazo de la „geografiaj bazoj de la mondhistorio”. Hegelo klarigas, ke maleblas kompreni ion de la konkreta historia kaj politika evoluo sen konsideri la geografion, la „grundon”, en kiu la „popolspirito” radikas, sen ekkoni ĝian „naturkuntekston” kiel „esencan kaj necesan bazon”.²

[Subjekto – objekto. Klarigoj pri Hegelo. Ampleksigita eldono], Frankfurto ĉe Majno, 1962, p. 71.

2 Saml., p. 69.

3 En la germana: *Konscientialismus*. -v1

1 Originale: *Vorlesungen über die Philosophie der Geschichte*. -v1

2 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Vorlesungen über die Philosophie der Geschichte* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Prelegoj pri la filozofio de la

Kiel ni vidas, la naturo estas ĉio alia ol malaperinta. Ĝi ludas eĉ rolon troigitan. La *Prelegoj pri la filozofio de la historio* konstatas, ke „malvarmo kaj varmego ... estas tro fortaj potencoj, ol ke ili permesus al la spirito konstrui mondon por si. ... Sed en tiu ekstremo de la zonoj la mizero verŝajne povas neniam ĉesi kaj neniam eviteblas, la homo estas konstante devigata direkti sian atenton al la naturo, al la ardaĵoj de la suno kaj al la glacia frostoj.”¹ Oni povus almenaŭ diri, ke la insistado pri la neŝanĝebleco de la naturaj donitaĵoj ŝajnas problemeca. Ni povas konsenti kun Hegelo, ke la civilizacioj ĉe la maro montras ĝenerale pli da malfermiteco kaj da entrepren-spirito. Kaj: „La kamparo, la vala ebenaĵo fiksas la homon al la grundo, per tio li venas en senfinan amason da dependecoj.”² Sed ni ne povas konsenti la konkludon, laŭ kiu en la civilizacioj ĉe la maro „la komerco ... kaj la ŝipveturado” iras sampaŝe kun „la burĝa libereco”.³ Ĉi tie li forŝovas la sklavkomercon, kiu estas dum longa tempo gvidata de regionoj kaj urboj, kiuj troviĝas ĉe la maro kaj kiuj ĝuste aktive okupiĝas pri komerco kaj ŝipveturado.

Krom la fizika naturo, ankaŭ la biologia naturo de la homo ludas esencan rolon ĉe Hegelo. La triumfo de la hispanaj konkerantoj en la Nova Mondo estas klarigata per serio da kaŭzoj: la manko „de la ĉevaloj kaj de la fero” kaj la „malforteco de la amerika korpa konstitucio” de la praloĝantaro.¹ Sed li ne pritraktas la profundegajn kontraŭecojn kaj konfliktojn, kiujn la antaŭkolumbiaj socioj trairis kaj kiuj verŝajne ĉe ilia malvenko kontraŭ la invadantoj ludis pli gravan rolon ol la delikata korpa konstitucio de la indiĝenoj. Fine direndas, ke Hegelo avertas kontraŭ la danĝero de reduktismo kaj resumas sian starpunkton jene: „La naturon oni taksu ne tro alte nek tro malalte.”² Kaj se tamen necesas ion kritike riproĉi al la filozofo, tiam ne lian idealismon, sed lian okazan falon en la naturalismon.

Kun tiuj premisoj, la supre citita esprimo en la *Ekonomiaj-filozofiaj*

historio], en: *Werke in zwanzig Bänden*, Frankfurto ĉe Majno, 1969-1979, vol. 12, p. 105.

1 Saml., p. 106 s.

2 Saml., p. 118.

3 Saml., p. 131.

1 Saml., p. 108 s.

2 Saml., p. 106.

manuskriptoj, laŭ kiu la laboro, pri kiu Hegelo parolas, estas ekskluzive „abstrakte spirita”, rigardeblas nur kiel esprimo de juneca pintigo (la fakto, ke esprimo el notoj ne destinitaj al publikigado estis emfaze absolutigitaj, estas precipe la respondeco de la de interpretantoj en la 20-a jarcento). En la realo la naturo ne nur bone ĉeestas en la *Filozofio de la historio*, ĝi ankaŭ tute ne mankas en la politika filozofio de Hegelo: „Praktike la homo kondutas al la naturo, kiel al io senpera kaj ekstera, mem kiel senpere ekstera kaj per tio sensa individuo ...”¹ Temas pri praktika rilato, kiu montriĝas tra la laboro, kaj la akra devo de la laboro premisas la reziston kaj do la materian forton de la naturo: „Serioza estas la laboro rilate al la bezono; mi aŭ la naturo devas pereji; se unu el ili devas daŭri, tiam la alia devas fali.”² Kaj estus neeviteble la homo, kiu devus cedi kaj subiĝi, se li farus la batalon kun malplenaj manoj: „Kiajn ajn fortojn la naturo disvolvas kaj uzas kontraŭ la homon – malvarmon, sovaĝajn bestojn, akvon, fajron –, li scias rimedojn kontraŭ ĝi, kaj pli precize li prenas la rimedojn el ĝi, uzas ilin kontraŭ ĝi mem.”³ Jes, la evoluo de la teĥniko, de la produktadrimedoj, finfine de la historio, estas la respondo de la homo al la rezistado de la naturo, kiu kontraŭstaras la kontentigon de liaj bezonoj: „La naturaj objektoj nome estas potencaj kaj faras plej diversan rezistadon. Por venki ilin, la homo interŝovas aliajn naturajn aĵojn, per tio turnas la naturon kontraŭ la naturon mem kaj inventas *ilojn* tiucele. Tiuj homaj inventoj apartenas al la spirito, kaj tia ilo estas pli alte konsiderenda ol la naturoobjekto.”⁴ Kaj ĉiam, kiam ĝi estas rezulto de la batalo, kiun la homo faras por certigi sian pluividon kaj la plibonigon de siaj vivkondiĉoj, la ilo staras super la momenta kontentigo de la bezonoj, kiujn ĝi kapablas kontentigi: „... la *plugilo* estas pli honora ol estas rekte la ĝuoj, kiuj per ĝi prepariĝas kaj la celoj. La *ilo* konserviĝas, dum la rektaj ĝuoj pereas kaj forgesiĝas.”⁵ Ne estas hazardo, ke en la

-
- 1 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Enzyklopädie der philosophischen Wissenschaften* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Enciklopedio de la filozofiaj sciencoj] (**en la sekvo: Hegelo: Enciklopedio**), § 245, en: *Werke* vol. 9, p. 13.
 - 2 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Vorlesungen über die Philosophie der Geschichte* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Prelegoj pri la filozofio de la historio], (**en la sekvo: Hegelo: Prelegoj**), l.c., p. 297 s.
 - 3 Hegelo, Enciklopedio, § 245, p. 14.
 - 4 Hegelo: Prelegoj, p. 295.
 - 5 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Wissenschaft der Logik II* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Scienco de la logiko II] (**en la sekvo: Hegelo: Logiko**), en:

antikva Grekio la „hono de la homa invento por mastri la naturon ... atribuiĝas al la dioj”.⁶

Tamen temas pri „malsovaĝigo”, kiu tute ne estas senfina. La dilemo, laŭ kiu en la rilato homo-naturo unu el la du grandoj devas cedi, ĝenus la adeptojn de la moderna ekologia movado. Sed ili konsentus la finan observon de la *Enciklopedio*: En sia batalo la homo atingas gravajn venkojn, kiuj estas tamen ĉiam nur partaj venkoj, ĉar „la naturon mem, ĝian ĝeneralon, li tiel ne povas majstri nek dresi ĝin por siaj celoj.”¹

Ĉe Hegelo la naturo tiom ĉeestas, ke ĝi ludas eĉ esencan rolon en la difino de la centraj kategorioj de la politika diskurso. Ni prenu ekz-e la nocion de „libereco”. Kial la malsatanto, kiu pro la malsato riskas perdi sian vivon, troviĝas jam nur pro tio en situacio de „totala senrajteco”,¹ en la maleblo realigi „la tutan amplekso de la libereco”² kaj sekve en substanca sklaveco?³ – Pro la fakto, ke „la vivo [prezentas] la realan flankon de la personeco”. Hegelo rekondukas nin ĉi tie al la biologia naturo de la homo; ĝia centreco fariĝas plej alta evidento per la konstato ke la „vivo posedas veran rajton kontraŭ formala rajto”.⁴

Werke, vol. 6, p. 453.

6 Hegelo: Prelegoj, p. 295.

1 Hegelo: Enciklopedio, § 245, p. 14.

1 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Grundlinien der Philosophie des Rechts oder Naturrecht und Staatswissenschaft im Grudrisse* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Bazaj linioj de la filozofio de juro aŭ naturrajto kaj ŝtatscienco en baza strukturo (**en la sekvo: Hegelo: Bazaj linioj**), § 127, en: Werke, vol. 7, p. 240.

2 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Philosophie des Rechts, nach der Vorlesungsnachschrift K. G. v. Griesheim 1824/25, Bd IV, Hrsg. K. H. Ilting, Stuttgart-Bad Cannstatt 1974* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Jurfilozofio, laŭ la postskribo de la prelego K. G. v. Griesheim 1824/1825, vol. IV, eld. K. H. Ilting, Ŝtutgarto-Bad Cannstatt 1974] (**en la sekvo: Hegelo: Jurfilozofio Griesheim**), p. 342.

3 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Philosophie des Rechts. Die Vorlesung von 1819 nach einer Nachschrift, Hrsg. D. Henrich, Frankfurt am Main, 1983* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Jurfilozofio. La prelego de 1819 laŭ postskribo, eld. D. Henrich, Frankfurto ĉe Majno, 1983] (**en la sekvo: Hegelo: Jurfilozofio Henrich**), p. 196.

4 Hegelo: Bazaj linioj, p. 240.

Se laboristo – kaj eĉ se kontrakte – cedus sian tutan konkretan vivtempo al la dungisto, li estus reduktita al la stato de sklavo. Ni legu la *Bazajn liniojn de la jurfilozofio*: „Per la eksterigo de mia tuta per la laboro konkreta tempo kaj de la tuta mia produktado mi farus ĝian substancon, mian *ĝeneralan* agadon kaj realon, mian personecon proprieto de aliulo.”¹

Eble eĉ pli esprimfortaj estas la teksteroj en la prelegoj: „Per la eksterigo de mia *tuta* per laboro plenigenda tempo mi farus mian ĝeneralan agadon kaj realon, mian personecon proprieto de aliulo.”¹ Kaj plue: „Per la eksterigo do de mia tuta konkreta tempo, plenigita per mia laboro, aŭ la produktado en ĝia tuteco, ankaŭ la tutaĵo estas kune eksterigata. ... Mia personeco do konserviĝas nur, se nur parto de mia aparteco limigita de la tempo estas eksterigata.”²

Dum en la *Bazaj linioj* la persono kaj la libereco de la persono estas pensataj kaj difinataj el la perspektivo de la „vivo”, ili estas nun pensataj kaj difinataj el la konkreta labor- kaj viv-tempo; kaj ankaŭ el la tutaĵo de la aktivecoj kaj montriĝoj de la homaj vivofortoj. Tie oni estas tre malproksima de la aserto, ke „abstrakte spirita” laboro estas la objekto de la hegela analizo. Tiu analizo funkcias klare kiel bazo de tio, kion *La kapitalo* en epopeaj vortoj nomas la batalo por regulado kaj reduktado de la labortempo kaj gloras kiel batalo por libereco. En la vortoj de Markso la laboristo organizas sin kaj batalas por ne esti „por sia tuta vivtago” reduktata al simpla laborforto, por ne suferi kroman „mallongigon de sia vivtempo”.¹ La

1 Saml., p. 240.

1 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Philosophie des Rechts, § 36. Die Mitschriften Wannenmann (Heidelberg 1817/18 und Homeyer (Berlin 1818/19), Hrg. K. H. Ilting, Stuttgart, 1983* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Jurfilozofio, § 36. La kunskribaĵoj de Wannenmann (Hejdelbergo 1817/1818 kaj Homeyer (Berlino 1818/1819), eld. de K. H. Ilting, Ŝtutgarto, 1983] (**en la sekvo: Hegelo: Jurfilozofio Wannenmann**), p. 230 s.

2 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Philosophie des Rechts. Nach der Vorlesungsnachschrift von H. G. Hotho 1822/23, Hrg. D. Henrich, Frankfurt am Main, 1983* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Jurfilozofio. Laŭ la postskribo de la prelego fare de H. G. Hotho 1822/1823, eld. de D. Henrich, Frankfurto ĉe Majno, 1983] (**en la sekvo: Hegelo: Jurfilozofio Hotho**), p. 254.

1 Karlo Markso: La kapitalo, volumo I. Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano,

kapitalo citas kaj emfazas akuzon, kiun la usonaj laboristoj faras, nome „ke la longeco de la labortempo postulata sub la nuna sistemo estas tro granda kaj ne lasas al la laboristo tempon por ripozo kaj disvolviĝo, sed male premas lin al situacio de servuto kiu malmulte pli bonas ol sklaveco”²

Ni revenu nun al la hegela filozofio de la historio: La historio de la libereco estas ankaŭ la historio de la progresanta liberigo de la (korpa) laboro el la ligiloj de la sklaveco kaj servuteco. En la despota oriento praktike ĉiuj estis „servistoj por realigi gigantajn projektojn”.¹ En Grekio, kie la historio de la libereco envere komenciĝas, „la apartaĵo apartenanta al la bezono (t.e. de la kontentigo de la bezonoj per la materia laboro) ankoraŭ ne estas enprenita en la liberecon, sed ekskludita al stato de sklaveco”.² Ni scias, ke ankaŭ en la nuntempa mondo la ne dungita aŭ ne laborkapabla laboristo povas malsatmorti kaj vivas sub kondiĉoj de substanca sklaveco. La historio de la libereco kaj de la liberigo de la (korpa) laboro ankoraŭ ne finiĝis.

La esto kaj la socia esto

Rilate al la jam citita teksto, en kiu Hegelo konfirmas, ke la homo rilatas al la ekstera naturo „praktike”, Lenino eksplicite kunigas „Hegelon kaj Markson” kaj emfazas ĉe Hegelo „rudimentojn de historia materiismo”.¹ Sed kio estas la historia materiismo? En la *Germana ideologio* ni povas legi: „La konscio neniam povas esti io alia ol la konscia esto, kaj la esto de la homoj estas ilia reala vivprocezo.”² Ni rigardu nun la formulon en la

Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, ISBN 978-2-918300-59-5 (en la sekvo: **Karlo Markso: La kapitalo 1**), p. 252 sj [kaj p. 604] (en la germana: MEW, vol. 23, p. 280 s).

2 Karlo Markso: La kapitalo 1, p. 281.

1 Hegelo: Jurfilozofio – Wannemann, p. 199.

2 Hegelo: Bazaj linioj, § 356, p. 510.

1 *W. I. Lenin: Konspektu zu Hegels „Vorlesungen über die Philosophie der Geschichte”, in: W. I. Lenin: Werke, Bd. 38, Berlin, 1970* [V. I. Lenino: Konspekto pri Hegelo: Prelegoj pri la filozofio de la historio”, en: Werke, vol. 38, Berlino, 1970] (en la sekvo: **Lenino: Konspekto**), p. 301 s.

2 *Karl Marx, Friedrich Engels: Die deutsche Ideologie* [Karlo Markso, Frederiko Engelso: La germana ideologio] (en la sekvo: **Markso-Engelso: Germana**

Antaŭparolo al Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio: „Ne estas la konscio de la homoj kiu determinas ilian eston, sed inverse ilia socia esto kiu determinas ilian konscion.”³ Ni povas do formuli la problemon jene: Ĉu por difini la historian materiismon oni devas reveni al la „esto” aŭ al la „socia esto”? Evidentas, ke ekzistas rilato inter la du, sed la kompreno de la sociaj konfliktoj kaj de la historiaj procezoj postulas unuavice analizon de la socia esto. Alie la tezo estus senseca, per kiu la *Manifesto de la Komunista Partio* komenciĝas, laŭ kiu la historio estas „historio de klasbataloj”. Aliflanke nur tiel eblas klarigi la riproĉon je historia idealismo, kiun la *Germana ideologio* faras kontraŭ filozofo, kiu siavice ne laciĝas elmontrian materiismon: „Kie Fojerbaĥo estas materiisto, la historio ĉe li ne aperas, kaj kie li konsideras la historion, li ne estas materiisto. Ĉe li, materiismo kaj historio tute disas.”⁴ Per aliaj vortoj: Ĉe Fojerbaĥo ĉiam aperas la rilato al la naturo, al la natura esto, sed mankas la plej esenca, la atento al la socia esto, al la socia objektiveco. Pro tiu manko li konsistigas la subjekton ĉiam nur el la ĝenerala „homo”, anstataŭ el la „reala historia homo”⁵, el la homoj, kiuj komprenendas en la kunteksto kun la historie determinitaj materiaj vivkondiĉoj kaj kiuj troviĝas en sociaj rilatoj kaj en sociaj konfliktoj, kiuj ankaŭ estas historie determinitaj. Ĉe tiu punkto trudiĝas la demando, kiel statas la aferoj ĉe Hegelo. La sama Bloch, kiu kulpigas lin esti dissolvinta la objektivcon kiel tian, por karakterizi la laŭdire idealisman filozofon, sagace observas la grandiozan „inversigon de la (romantika) ironio de la subjekto al tiu de la objekto”.⁶ La objekto, pri kiu li parolas, estas la socia objekto, la socia esto. Oni povus diri kaj emfazi, ke la disvolviĝo de la *Fenomenologio de la spirito* estas la progresanta kaj ĉiam pli riĉiĝanta kaj maturiĝanta ekkono de la pezo de la socia esto, el kiu oni ne povas nek rajtas eskapi, eĉ se oni havas, kaj eĉ speciale kiam oni

ideologio), en: MEW, vol. 3, p. 26.

- 3 Karlo Markso: Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo, en: Karlo Markso: Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo. (Librofina listo n-ro 44).
- 4 Markso-Engelso: Germana ideologio, p. 45.
- 5 Saml., p. 42.
- 6 Ernst Bloch: *Karl Marx, der Tod und die Apokalypse*, in: [Ernst Bloch: Karlo Markso, la morto kaj la apokalipso, en:] *Religion und Erbe*, Munkeno kaj Hamburgo, 1967, p. 24.

havas ambiciajn planojn por ŝanĝi la mondon. Ĉiam, kiam la konscio pensas suverene kondukti rilate al la socia esto, tiu lasta tamen pruviĝas esti pli suverena. Kaj tiel okazas, ke la „irado de la mondo” kun sia ironio regas super la „virto”. Kaj la reala historia procezo regas kun sia ironio unue super la „sincera konscio”, poste en diversa maniero super la „nobla konscio” kaj fine super la „bela animo”. Lukaĉo ĝis la fino riproĉas al Hegelo,⁷ ke li identigis la „fremdiĝon”⁸ kun la „konkretiĝo” kaj eĉ kun la „konkret-eco”. Do, temas ĉi tie pri filozofa, kiu fuĝas el la objektiveco kvazaŭ antaŭ kontaĝa malsano. Tamen ĝuste tio estas la kritiko, kiun Hegelo faras al Kantio kaj al la bela animo. Li estas kvazaŭ paralizita antaŭ la „angoro antaŭ la objekto”.⁹ Pri la bela animo: Al tiu estaĵo mankas „la forto de eksteriĝo, la forto aĵiĝi kaj elteni la eston. Ĝi vivas en la angoro makuli la majestecon de sia interno per ago kaj ekzistado; kaj por konservi la purecon de sia koro, ĝi fuĝe evitas la tuŝon de la realo”.¹⁰ Laŭ Hegelo, la liatempa Germanio suferas kvazaŭ nacian malsanon, kiun li nomas „hipoĥondrio”. Jes, la hipoĥondrio estas la reganta „rigardmaniero”, kiu „vantigis”¹¹ ĉian objektivcon, kaj poste jam ĝuas nur tiun vantecon en si mem.”¹² Do, Lukaĉo atribuas al Hegelo la malsanon, kiun tiu tiom forte diagnozas kaj denuncas!

Indas memori, ke Markso kaj Engelso profunde aprezis kaj transprenis la hegelan ironion de la objekto. Ili uzas ĝin por primoki tiujn, kiuj – speciale post la malvenko de revolucio – anstataŭ okupiĝi pri la analizo de la objektivaj kontraŭecoj, pri la ideologiaj malfortaĵoj kaj pri la politikaj eraroj – preferas liveri pruvojn unuflanke pri la boneco kaj pureco de siaj propraj opinioj kaj aliflanke pri la ĝenerala fieco kaj malfavoro de la cirkon-

7 Lukaĉo: *Ontologio*, p. 540.

8 Originale: *Entfremdung*, kio signifas kaj *fremdiĝo* kaj *fremdigo*, laŭ la respektiva perspektivo. Plej ofte ne eblas klare distingi inter fremdiĝo kaj fremdigo (ĉar komprenebla ambaŭ nomas la saman fenomenon sub kontraŭaj perspektivoj). -vl

9 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel, Werke*, vol. 5, p. 45.

10 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Die Phänomenologie des Geistes* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: La fenomenologio de la spirito], en: *Werke*, vol. 3 (**en la sekvo: Hegelo: Fenomenologio**), p. 483.

11 En la originalo: *vereitelt*, kio signifas samtempe *vantigis* kaj *vanigis*. -vl

12 Hegelo, citita laŭ Domenico Losurdo: *Hegel und das deutsche Erbe*, Kolonjo, p. 330.

stancoj kaj entute de la mondirado. Kiam Markso kaj Engelso kondamnas tiun historian idealismon kiel senefika en politika rilato kaj narcisa en morala rilato, ili eksplicite kaj ripete referencas la bildojn de la *Fenomenologio de la spirito*, kiujn ni supre citis. Arnold Ruge kaj la ceteraj samspecaj „revoluciuloj”, kiuj venis al la konkludo, „ke la mondo estas regata per tre malmulte da saĝo”, povis nur elmontri sian „sinceran konscion” aŭ sian „noblan konscion”. En Germanio same kiel en Francio oni vidas en la jaroj post 1848 la „belan animon” pufiĝi kaj plori pri tio, ke ĝi sentas sin „miskomprenata” kaj ne komprenata de la profana homaro. Sed „laŭ Hegelo la nobla konscio nepre transformiĝas en la *fian*.”¹ Ĉe pli preciza rigardo la bela animo tre rapide perdas sian laŭdiran senmakulecon.

Dum laŭ la juĝo de Markso ĉe Fojerbaĥo la mankanta atento pri la socia objekto iras sampaŝe kun koncepto de la historio, en kiu ne estas spaco por la „realaj historiaj homoj”, t.e. por la homoj, kiuj estas ligitaj kun difinitaj sociaj kaj klasaj rilatoj, por Hegelo ĝustas la malo: La atento, kiun tiu dediĉas al la socia konflikto kaj al ĝia konkreta elformiĝo, estas grandega. Tio veras por la antikva kiel por la moderna kaj samtempa historio. Mi limigu min al unu ekzemplo: En la malnova reĝimo (*ancien régime*) la „libereco de la baronoj” kondiĉas la „absolutan servutecon” de la „nacio” kaj malebligas la „liberigon de la servutuloj”. Pro tio konstatendas: „La popolo ... estas ĉie liberigita per la subpremado de la baronoj.”¹ La aristokrataro sentas la perdon de la privilegio, kiu faris ĝin ekz-e la sola portanto de la jurisdikcio, kiel „maldecan perfortaĵon, subpremadon de la libereco kaj despotismon”.² Hegelo do observas: „Oni devas, kiam paroliĝas pri

1 *Karl Marx: Die Ritter vom edelmütigen Bewußtsein* [Karlo Markso: La kavaliroj de nobla konscio], en: MEW, vol. 9, p. 493. Vd ankaŭ *Karl Marx: Der achtzehnte Brumaire des Louis Bonaparte* [Karlo Markso: La dekoka brumero de Louis Bonaparte], en: MEW, vol. 8, p. 185; *Karl Marx/Friedrich Engels: Die großen Männer des Exils* [Karlo Markso/Frederiko Engelso: La grandaj homoj de la ekzilo], en: MEW, vol. 8, p. 245, 275 s, kaj: *Friedrich Engels: Antwort an Herrn Paul Ernst* [Frederiko Engelso: Respondo al s-ro Paul Ernst], en: MEW, vol. 22, p. 83 s.

1 *Georg Wilhelm Friedrich Hegel: Vorlesungen über die Philosophie der Weltgeschichte, hg. von G. Lasson* [Georgo Vilhelmo Frederiko Hegelo: Prelegoj pri la filozofio de la mondhistorio, ed. de G. Lasson], Lepsiko, 1990-1920 (**en la sekvo: Hegelo: Mondhistorio**), p. 902 s.

2 Hegelo: Bazaj linioj, § 219, p. 373.

libereco, ĉiam bone atenti, ĉu ne temas envere pri privataj interesoj, pri kiuj paroliĝas.”³ Tio estas konkludo, kiu ricevas la intereson kaj la aplaŭdon de Lenino, kiu pro la meritplena atento pri la „klasrilatoj” siavice perceptas „rudimentojn” de „historia materiismo”.⁴

La historia idealismo kiel malfortigo aŭ negado de la socia esto

Kaj ree – ankaŭ en la okuloj de Lenino – la historia materiismo resendadas unue al la socia esto. Kaj estas la vido de la socia esto, la vido de la historio kaj de la socio, de la „artefarita tereno” (por diri tion kun Labriola), sur kiu la vivo de la homo, de la dua naturo, ligiĝas al la decida batalejo de la politika-ideologia batalo; ankaŭ se necesas aldoni, ke la socia esto estas siavice kondiĉata de la natura esto. „Materiisman” vidon de la unua naturo, kaj t.e. la konfirmo de la unuarangeco de la objekto antaŭ la subjekto, de la naturo antaŭ la konscio, troviĝas ankaŭ en la kampo de la religioj, sed tio ne malhelpis ilin fariĝi dum jarmiloj instrumento de la idealisma incensado kaj sanktigo de la ekzistantaj politikaj-sociaj kondiĉoj. Kaj la „materiisma” vido de la unua naturo kompreneble karakterizas Fojerbaĥon, sed tio ne malhelpas lin fali en la historian idealismon. El la vidpunkto de Markso (kaj de Engelso) oni povas eble fari analogan kritikon al tiu Hegelo, kiu limigas al la moderaj klimatozonoj la regionon, en kiu la mondhistorie gravaj popoloj povas estiĝi, aŭ kiu atribuis al la malforta konstitucio de la amerikaj indianoj sufiĉan gravecon por klarigi la katastrofon, kiun ili suferis de la hispanaj konkerantoj. Tia idealismo tamen ne samigeblas kun konsciismo. Sed kial la interpretado de la hegela pensado kiel konsciismo estas tiom disvastiĝinta? Ĉe la respondo al tiu demando eble povas helpi observo de la malfrua Lukaĉo. Post emfazi, kiel ni scias, la eksterordinaran „realecosenton” de Hegelo, li aldonas, ke „por li – samtempe kun la alproprigo de la faktoj mem – la kategoria eco estis en la centro de lia atento”.¹ Sufiĉas disigi la unuan konstaton disde la dua, kaj la afero klaras!

Fakte ĉia konsciismo estas fremda al Hegelo, li eĉ estas ekstreme mal-

3 Hegelo: Mondhistorio, p. 902.

4 Lenino: Konspekto, p. 301 kaj 303.

1 Georgo Lukaĉo: Ontologio, p. 483.

proksima de la historia idealismo. Por ekkoni tion, sufiĉas unu ekzemplo. Inter la fino de la 18-a jarcento kaj la unuaj jardekoj de la 19-a jarcento la kulturo kaj la politika filozofio de la Okcidento alfrontiĝas problemon: Kiel klarigi la malsaman evoluon de Francio kompare al Anglio kaj Usono? En la unua lando al la revolucio sekvis kontraŭrevolucio, kiu siavice malfermis la vojon al kroma revolucio. Unu politika reĝimo anstataŭis alian: absolutisma monarĥio, konstitucia monarĥio, jakobena teroro, armea diktatoreco, imperiestra regno, demokratia respubliko, bonapartismo ... Kaj oni ne sukcesis antaŭsupozi la finon de la krizo kaj la stabiliĝon. Kiom impresis ĉi kontrastis kun la laŭgrada kaj konstruema evoluo en la aliaj du landoj! Kiel do klarigi tiun radikalan diferencon? Gravaj aŭtoroj kiel Tocqueville kaj J. S. Mill celebris la robustan moralan kaj praktikan senton kaj amon al la aŭtonomeco kaj al individua libereco, kiuj laŭdire karakterizas la anglojn kaj usonanojn: kaj – kontraste al la malfeliĉa naturo de la francoj – danke al tiaj virtoj ili sukcesas eviti la hororon de internaj militoj kaj savi la liberecon. Tiu klarigo aperas – almenaŭ koncerne Tocqueville-on – en tempo, en kiu, malmultajn jarojn antaŭ ol la secesia milito en Usono faras sangelverŝon, en kiu la institucio de sklavisimo ĝuste en Usono estas vivanta kaj forta. Kaj du jardekojn poste, Francio vidas la estiĝon de solida parlamenta demokratio, kiu estas certe ne malpli progresema ol la angla kaj la usona.

Ni turnu nin al la interpreto de Hegelo. La *Prelegoj pri la filozofio de la historio* emfazas du gravajn punktojn: 1-e „La nordamerikaj liberaj ŝtatoj ne havas najbaran ŝtaton, kontraŭ kiu ili estus en rilato kiel la eŭropaj ŝtatoj inter si, kiun ili observas kun malfido kaj kontraŭ kiu ili devus teni konstantan armeon”. 2-e, la „eliro per koloniigo” ebligas al la nordamerika respubliko en konsiderinda mezuro malprajmi la sociajn konfliktojn. Fine tio signifas: „se la arbaroj de Germanio estus ankoraŭ ekzistantaj, tiam kompreneble la Franca Revolucio ne estus enmondiĝinta”¹ – aŭ ĝi estus okazinta malpli radikale kaj malpli perforte. Ne alie ol Hegelo argumentas Engelso, kiu koncerne Nordamerikon konstatas: „Ĉi tie la klasaj kontraŭecoj estas nur nekomplete evoluintaj; la klasaj kolizioj ĉiufoje malklariĝas pro la foriro de la proleta superloĝantaro al la Okcidento.”²

1 Hegelo: *Prelegoj*, p. 114 kaj 113.

2 *Karl Marx/Friedrich Engels: Rezensionen aus der „Neuen Rheinischen Zeitung”*, [Karlo Markso/Frederiko Engelso: Recenzoj el la „Nova Rejna Gazeto”, en: MEW, vol. 7, p. 288.

Jen do du materiismaj klarigoj. Sed tiu de Hegelo estas la pli ampleksa, ĉar ĝi daŭrigas elementon, kiu mankas ĉe Engelso, nome la geopolitikan kuntekston. Almenaŭ el la vido de Hegelo, la geopolitika kunteksto (la avantaĝo de Usono ne havi ĉe siaj landlimoj grandajn potencojn, kiuj tendence estus konkurantoj) ne estas simple donita de la naturo, sed ja stampita de la historio: Ĉi tie temas pri *kroma* esprimiĝo de la socia esto.

Kun la kliŝa kontraŭmeto, kiun Tocqueville kaj Mill faras inter francoj unuflanke kaj angloj kaj usonanoj aliflanke, la historia idealismo baziĝas sur la ignorado de la socia esto kaj sur la enkonduko de ne ekzistanta natura esto. La saman observon oni povas fari ankaŭ ĉe aliaj pensfluoj, kiuj ankoraŭ pli akre glitas de la socia esto al ideo de la esto, kiu eliras de supozata antropologia kaj rasa naturo.

Kritiko de la idealismo kaj ontologio de la socia esto

Se oni sekvas la instruojn de Markso kaj Engelso, tiam eblas riproĉi al Hegelo refalojn en la historian idealismon. Sed ĉu tiuj, kiuj la unuaj okupiĝis pri la teoria sistemigo de la historia materiismo, estas imunaj kontraŭ tiaj refaloj? En la komunisma socio, kiujn Markso kaj Engelso antaŭvidis, malaperas kune kun la klasa sistemo la merkato, la nacio, la religio, la ŝtato kaj eble eĉ la jura normo kiel tia, ĉar ĝi fariĝis superflua per tiel miriga evoluo de la produktadfortoj, ke la libera kontentigo de ĉia bezono fariĝas ebla kaj per tio ankaŭ la malfacila tasko distribui la resursojn. Ĉu tia vizio staras sur la nivelo de la historia materiismo? Kiam la malfrua Lukaĉo okupiĝis pri la marksisma tradici-linio ĉe la konstruado de la *Ontologio de la socia esto*, li prave avertis kontraŭ duobla danĝero de la historia idealismo: „Aŭ la socia esto tute ne distingiĝas de la esto entute, aŭ temas pri io radikale alia, kiu jam ne havas estkarakteron.¹ Per tio, ke ĝi insistas pri la praktiko kaj pri la transformeblo de la mondo, la revolucia pensado estas en la danĝero de la dua speco de historia idealismo. Oni pensu pri Fiŝto, kiu establis paralelismon inter sia *Bazo de la tuta sciencinstruo* kaj la forta aktiveco de la revolucia Francio: „... kiel tiu nacio deŝiras la homon disde liaj eksteraj katenoj, mia sistemo deŝiras lin disde la katenoj de la aĝoj mem,

1 Georgo Lukaĉo: *Ontologio de la socia esto*, vol. 13, p. 325.

de la ekstera influo ...”.² Sed ne alie ol Fiŝto poziciigis la juna Lukaĉo en la jaro 1922, kiam li, sub la influo de la revolucio ŝanĝanta la mondon, skribis: „Ĉar nur ĉi tie, kie la kerno de la esto malvualiĝis kiel socia okazaĵo, la esto povas aperi kiel ĝis nun senkonscia produkto de la homa agado, kaj tiu agado mem siavice kiel la decida elemento de la transformado de la esto.”³ Ankaŭ ĉi tie percepteblas io, kion oni povus nomi idealismo de la praktiko.

La evoluo de Markso kaj de Engelso okazis en la jaroj, en kiuj unuflanke la eĥo de la Franca Revolucio estis ankoraŭ forta. Aliflanke senteblas jam la antaŭsignoj de la giganta revolucia ondo de 1848. Tiu devus – tiel la esperoj de la du junaj revoluciuloj – iri trans la malnovajn klaskondiĉojn kaj ankaŭ ataki la burĝan ordon. Tiel bone kompreneblas, ke en la vizio de komunismo, kiun ili tiam disvolvis, la merkato, la nacio, la religio, la ŝtato tendencas perdi „la estkarakteron” – por diri tion en la lingvo de la pli matura Lukaĉo.

La esto de la socia esto malfortigeblas aŭ negeblas en du diversaj manieroj. Tia rezulto unuavice atingeblas per skemeca vido de la historieco, kiu ne kapablas distingi inter mallonga kaj longa daŭro. La historieco de la nacioj kaj de la naciaj lingvoj ne estas diskutibla, sed aserti ilian estingiĝon sur la ondo de radikala revolucio, signifas perdi la longtempan dimension. Aŭ oni flegas distorditan vidmanieron de la socia esto, kiu agordas ĝin kiel homogenan realon reguligatan de homogena historia tempo. Sed male al tio, evoluas tiom malsamaj realaĵoj, kiel ekz-e la modoj, la politikaj institucioj, la naciaj lingvoj, sur tiom radikale malsamaj tempo-reloj kaj estas do ĉiufoje karakterizitaj de malsama ontologia larĝeco.

Tio signifas, ke la ekzisto de la socia esto malfortigeblas aŭ negeblas, se oni perdas el la okuloj la multe da naturo kiu pluvivas en la historia kaj politika mondo: Socio povas esti kiom ajn evoluinta, la individuoj, kiuj konsistigas ĝin, restas submetitaj al la biologia rompiĝemo, restas naturaj estaĵoj – kaj tiu rompiĝemo montriĝas ne nur en malsano kaj morto, sed ankaŭ en la pasioj. Tio malebligas rekte identigi individuojn kaj specion, identigo pri kiu tiuj partoj de la komunista movado ofte revas, kiu estas plej

2 *Johann Gottlieb Fichte* [jóhan gótlip fiŝte]: *Briefwechsel* [Johano Gotlibo Fiŝto: Korespondaĵoj], ed. de H. Schulz, Lepsiko, 1930 (reprografia postpresaĵo Hil-desheim, 1967), vol. 1, p. 157.

3 Georgo Lukaĉo: *Historio kaj klaskonscio*, p. 192.

mesiismaj. La ebleco de konflikto inter diversaj individuoj restas ankaŭ en socio, kiu liberiĝis el la klasaj diseco kaj antagonismo. Kiun sencon tiam havas paroli pri la formortiĝo de la ŝtato, kaj eĉ de la jura ordo mem?

La du procezoj, el kiuj la malfortigo aŭ nuligo de la esto de la socia esto rezultas, povas ankaŭ interplektiĝi: Tio okazas, kiam oni atendas, ke la religio malaperos en la procezo de superado de la klasa subpremado. Unuflanke tia antaŭdiro forgesas, kiom da naturo restas konservita en la socia realo, kaj ĝi perdas el la okulo ankaŭ la provizorecon de la individua ekzistado, kiel ankaŭ la timon antaŭ la morto. Krome, tia antaŭdiro ne rimarkas la ligan inter religio kaj nacia identeco, ĉar antaŭ ol esti ekskluziva esprimo de klasbatalo, la religio montras ankaŭ socian realaĵon (la nacion) – kiu havas certe historian karakteron, sed estas submetita al tempeco de konsiderinda daŭro.

La historio de la „reala socialismo” estas ankaŭ la historio de dolora malkovro de la objektiveco de la socia esto. Malpli ol du jarojn post la eksplodo de la Oktobra Revolucio Gramŝo¹ konstatis, ke „nur la bolŝevistoj sciis ĉesigi la profundan falon en mizeron, barbarecon kaj anarĥion kaj dissolviĝon”, lanĉitan „de longa kaj katastrofa milito”. Anstataŭ tio, ili starigis „aristokrataron de ŝtatistoj” – kaj kiel la „plej granda ŝtatisto de la nuntempa Eŭropo” estas taksinda Lenino. Bone kompreneblas la skandaligita reago de anarĥiisma leganto de la *Ordine Nuovo*. Li indikas, ke la sovetia konstitucio mem starigas la celon krei ordon, en kies kadro ekzistos „nek klasaj diferencoj nek ŝtatpotenco”. La rusa ŝtato, savata de la defendantoj de formortanta ŝtato – jen ne la sola paradokso en la historio de la realsocialismo!

La Oktobra Revolucio devis do lanĉi laŭcelan procezon, kiu celis ne nur la forigon de la ŝtataj landlimoj, sed ankaŭ la dissolvon de la identecoj kaj limoj de la nacioj. Sed en marto 1929 Stalino devis konstati, „kiom kolosa kaj granda estas la stabileco de la nacioj.” Ankaŭ la sekva celo takseblas kiel paradokso, analoge al tio ĵus skribita: Per tio, ke la komunisma movado impulsis la emancipan movadon de la koloniaj popoloj, ĝi sendube en konsiderinda mezuro kontribuis al fortiĝo kaj multiĝo de la naciaj identecoj. La samo direblas pri la lingvoj, kiuj – ankaŭ laŭ opinio disvastiĝinta en marks-

1 Itale: *Antonio Gramsci* [elp.: antónjo grámŝi]; Antono Gramŝo. -vl

ismaj rondoj kaj dividita interalie de Kaŭcko¹ – devus pli aŭ malpli frue kunfandiĝi en la unueca lingvo de la fine unuiĝinta homaro. Sed tio ne sufiĉas: En postrestintaj kaj duonfeŭdismaj socioj la evoluo de la ekonomio kaj de la produktadfortoj apogata de la enpotenciĝintaj komunistoj kunportis ankaŭ la evoluon de la merktrilatoj kaj kutime ankaŭ la estiĝon de aŭtenta nacia merkato. El tio konkludendas, ke la reala registara praktiko enkrizigis la teorion platformon, per kiu, speciale en Ruslando, la komunistoj enpotenciĝis. Kompreneble ne mankis provoj kontraŭstari tiun disiĝon. Kiel Hans Kelsen, konata juristo, konstatis, la teorio de formortiĝo de la ŝtato estis de Stalino en 1939 fakte forlasita. Per tio Stalino povis ankaŭ kun pli aŭ malpli da prudento distanciĝi de la fina kunfluiĝo de la nacioj kaj de la naciaj lingvoj kiel ankaŭ de la opinio, laŭ kiu la „produktado por la merkato” estas sinonimo de „kapitalismo”.²

Kaj fine ankoraŭ la jenon: En la momento de la invado de USSR fare de la germana Tria Regno Stalino sukcese alvokis la ortodoksan eklezion, por ke ĝi subtenu kaj nutru la nacian rezistadon. Bedaŭrinde la (parta) religia toleremo daŭris nur mallongan etapon. Kaj tamen, se ni pensas pri la Tria Mondo, estas verŝajna, ke la ribelo de la koloniaj popoloj, tra diversaj peraj ŝtupoj fine ankaŭ fortigis la religiajn identecojn kaj la religian renaskiĝon, almenaŭ en kelkaj regionoj.

Entute oni adaptis la teorion al la praktiko malfrue, nur parte kaj kun kontraŭdiroj, kaj la damaĝoj kaŭzita de la historia idealismo (kaj de la mesiismo) estis gigantaj. Jam pro la konstanta esceptostato, la konstruado de demokratia jurŝtato estis tre malfacila, kaj en la perspektivo de dissolviĝo de la ŝtato ĝi ŝajnis eĉ tute sensenca. Kiam poste la konflikto inter Sovetio kaj Jugoslavio eksplodis kaj tiu inter Sovetio kaj Ĉinio, la kontraŭuloj – elirante de la komuna ideo, ke la konfliktoj inter la nacioj dissolviĝos kun la starigo de la socialismo – kulpigis sin reciproke je perfido. Ĉiu el ili estis konvinkita, ke li, en la senco de la historia materiismo, malkovris la klasajn

1 Germane: *Karl Kautsky* [kárl káŭcki]: Karlo Kaŭcko. -v1

2 Pri Gramŝo kaj Stalino vd D. Losurdo: *Stalin, Storia e critica di una leggenda nera*, Romo, 2008. (Germana eldono: „*Stalin. Geschichte und Kritik einer schwarzen Legende*” [D. Losurdo: Stalino. Historio kaj kritiko de nigra legendo], Kolonjo [papyrossa], 2011, aperonta; rim. de la red. [de tiu ĉi germana originalo]).

radikojn (t.e. la revenon de la kapitalismo) kiel kaŭzojn de la kritika konduto de la kontraŭa lando. Sed en la realo ili ĉiuj nur montris historian idealismon, per tio ke ili perdis el la vido la ontologian larĝecon de la naciaj realaĵoj kaj apartaĵoj, inter kiuj, ankaŭ post la starigo de la socialismo, diversaj interesoj plu ekzistas kiel ankaŭ eblaj kaŭzoj de konfliktoj.

La transiro de riparado al novpensado de la teorio ekkonturiĝas nur post la disfalo de la socialismo en orienta Eŭropo. Tiuj, kiuj sentas la senutilon de sinteno kiel tiu de Ruge kaj kiuj ne volas esti novaj enkarniĝo de la „bela animo”, de la „sincera konscio” kaj de la „nobla konscio” – kion jam Hegelo, Markso kaj Engelso primokis –, tiuj homoj direktas kun diversa lingvo kaj alirmetodo sian atenton al la neceso de ontologio de la socia esto. Tia tasko formuleblas el registara sperto aŭ el filozofia pensado. En la jaro 1991 Fidel Castro konstatis: „Ni socialistoj faris la eraron subtaksi la forton de la naciismo kaj de la religio.”¹ Milojn da kilometroj for de tie, rompante kun la kulturevolucio (kiun la radikala maldekstro en la Okcidento kelkfoje salutis kiel ebla komenco de formortiĝo de la ŝtato), Deng Xiaoping komence de la 1970-aj jaroj alvokis fortiĝi por la etendo kaj plibonigo de la „jursistemo” kaj por la enkonduko de la „regado de la leĝo” en la partio kaj „en la tuta socio” – antaŭkondiĉoj de reala evoluo de la „demokratio”.² Tiel, kiel la socialismo ne kaŭzis la formortiĝon de la ŝtato, ĝi ankaŭ ne kaŭzis la malaperon de la merkato, nek la kunagadon de la landoj okupiĝantaj pri la konstruado de la nova ordo en komunumon sen streĉiĝoj kaj konfliktoj. Kaj pro tio la sovetia-ĉina konflikto – laŭ la ĉina gvidanto interparolanta kun Gorbaĉovo en la printempo de 1989 – baziĝis malpli sur ideologiaj kontraŭecoj ol sur tio, ke „la ĉinoj ne estis traktataj je sama nivelo kaj sentis sin humiligataj”. Danke al la nova, pene ellaborita konscio nun eblis malfermi novan paĝon.³ Sed nun estis tro malfrue, almenaŭ por Sovetio, kaj ankaŭ por Ĉinio la situacio ne estis sendanĝera, kiel la „okazaĵo” sur la Tienanmen-placo montris.

La du memkritikaj bilancoj de Castro kaj Deng estas nove formulendaj

-
- 1 Arthur M. Schlesinger jr., *Four days with Fidel: A Havana Diary*, en: *The New York Review of Books* de 1992-03-26, p. 25.
 - 2 Deng Xiaoping, *Selected Works*, Pekino, *Foreign Languages Press*, 1992-1995, vol. 2, p. 196; vol. 3, p. 166 s.
 - 3 Saml., vol. 3, p. 285.

kaj ĝeneraligendaj. Oni subtaksis kiel objekton de idealisma modelo la pezon de la socia esto de la ŝtato, de la nacio, de la religio, de la merkato – la pezon de ĉio destinita malaperi. Tiel montriĝas, ke la marksismo bezonas ontologion de la socia esto. Tiun problemon la maljuna Lukaĉo klare formulis sur filozofia nivelo, eĉ se la libro dediĉita al tiu temo en grandaj partoj ne plenumas tiun pretendon. En la marksismo la ŝtato, la nacio, la religio, la multeco de la civilizacioj, la merkato, la diversaj elformiĝoj de la socia esto ankoraŭ atendas esti ontologie esplorataj. Ni povas nin demandi, ĉu ĉe la solvado de tiu tasko la analizoj, kiujn Hegelo faris pri tiu punkto, eble povas esti tre utilaj. Ĉi tie eblas nur tuŝi la temon. Sed la aŭtoro de tiuj ĉi linioj estas konvinkita, ke ĉe la solvado de la tasko rekonstrui kaj nove formuli la historian materiismon la pensado de Hegelo, de tiu filozofo obstine kaj supraĝe akuzita je idealismo, povas liveri esencan kontribuadon.

Elgermanigita el Domenico Losurdo: Hegel, Marx und die Ontologie des gesellschaftlichen Seins, en: Z. Zeitschrift Marxistische Erneuerung, n-ro 86, junio 2011, tradukita de Sabine Kebir el la itala al la germana.

Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo

La sekva artikolo havas la taskon doni supraĵan rigardon al la koncepto de fremdiĝo en la *Ontologio de la socia esto* de Lukaĉo,¹ kun aparta konsidero de la religio kiel la pratipo de ĉia precipe ideologie perataj fenomenoj de fremdiĝo. Tio ne povas fariĝi amplekse, des pli ke samtempe la kompleta koncepto de la lukaĉa *Ontologio* estu prezentota kiel renoviga projekto de la marksismo, en kiun la lukaĉa kompreno de la fenomenoj fremdiĝo, religio kaj kredo enordiĝas. La specifeco de la lukaĉa metodo estu ĉe tio montrata per dislimigo de aliaj provoj renovigi la marksismon.

Projekto materiisma etiko

Komence mi memorigu, ke Lukaĉo konceptis la *Ontologion de la socia esto* kiel antaŭlaboron por materiisma etiko kaj ke li vidis en ĝi sian plej gravan kontribuon al la renovigo de la marksismo, jam tiam konsiderata nepre necesa.² Unue Lukaĉo intencis, sekve al la „granda” *Estetiko*³ koncepti materiisman etikon, t.e. filozofion de la homaj valoroj kaj normoj sur materiisma bazo. Estas ambicia projekto voli dedukti el tio, *kio* estas, pli precize: el tio, *kiel ĝi fariĝis*, tion, *kio fariĝu*. Per tio Lukaĉo turnas sin kontraŭ metodoj, fondi etikan konduton kun referenco al transcenda (dia) potenco aŭ per subjektive-intuicia resp. senta aliro. Al tio li kontraŭmetas sian koncepton kompreni etikon evolu-historie kiel produkton de la homa memestiĝo. Survoje al tio estiĝis ĉe Lukaĉo la *Ontologio de la socia esto*, ĉar li dum la ellaborado konstatis, ke materiisma etiko bezonas ontologian bazon.⁴

1 En la germana: *Georg Lukács: Ontologie des gesellschaftlichen Seins*, publikigita kiel vol. 13 (Lukács 1984) inkluzive de la *Prolegomena* kaj vol. 14 (Lukács 1986) de la verkaro de Lukács.

2 Kp Benserler, Jung 2005, 483.

3 En la germana: *Ästhetik*, publikigita kiel vol. 11 *Ästhetik 1. Die Eigenart des Ästhetischen. 1. Halbband* (Lukács 1963a) kaj vol. 12 *Ästhetik 2. Die Eigenart des Ästhetischen. 2. Halbband* (Lukács 1963b) de la Lukács-verkaro.

4 Kp Benserler 1986, p. 731 s.

La strukturo de la Ontologio

La *Ontologio* de Lukaĉo, kiu komprenas sin, apoge al Nicolai Hartmann, kritike kiel „*Philosophia Ultima*”,⁵ estas la projekto de ampleksa instruado de kategorioj, kiu formulas la strukturon de la esto en tri sferoj: neorganikaĵo, organikaĵo kaj socia esto.⁶ Kvankam lia vera projekto konsistis en la el-laborado de socia ontologio cele al materiisma etiko, montriĝis tamen necesa almenaŭ supraĵa pritrakto de ĉiuj sferoj de la esto (inkluzive de la naturdialektiko), jam por kompreni la interrilaton (tio fariĝas aparte klara en la ekologia temo) kaj por la evoluhistoria deduktado.⁷

Ĉe tio Lukaĉo pretendas envere „nur” ellabori la ontologion, kiu envere jam ekzistas implicite ĉe Markso, inkluzive de la materiisma naturontologio, de la historieco kaj procezo de la esto kaj de la dialektika kontraŭeco ktp.⁸ Lukaĉo volas determini la eblecojn kaj kondiĉojn de la homa agado ĝenerale kaj, el tio deduktite, montri tiujn de la homa emancipiĝo.⁹

-
- 5 „*Philosophia Ultima*” celas ĉi tie, ke ĝi kritike alproprigas al si la rezultojn de la sciencoj kaj ĉe tio sekvas la „*intentio recta*” direktitan al la esto, en la linio „ĉiutagaĵo-scienco-ontologio” (kp Lukács 1984, p. 425 kaj 429), anstataŭ esti dogme postulata kiel klasika (idealisma) „*Philosophia Prima*”. Sendepende de tio, la kritika ontologio de Lukaĉo – kiel tiu de Hartmann – komprenas sin kiel bazan kaj tiurilate unuan filozofion, sur kiu ekz-e la etiko devas konstruiĝi (kp Tertullian 2005b, p. 78).
 - 6 Vd apud la ĉapitro pri la ontologio de Hartmann antaŭ ĉio la *Prolegomena*, kp Lukács 1984, p. 8 sj kaj 421 sj; pri la lukaĉa kritika akcepto de la hartmana ontologio kp Vellay 2012b.
 - 7 Ke li per la rifuzo de la dialektiko de la naturo envere nur agnoskis la socian eston kiel eston, tion Lukaĉo nomas la „baza ontologia eraro” de sia verŝajne plej influriĉa juneca verko „Historio kaj klaskonscio” [germ.: *Geschichte und Klassenbewußtsein*] de 1923 (publikigita kiel volumo 2 de la Lukács-verkaro en la jaro 1968, vd Lukács 1968a), ĉar per tio „komplete mankas tiu universaleco de la marksismo, kiu el la neorganika naturo deduktas la organikan kaj el al organika naturo tra la laboro la socion”. (Kp Eörsi 2005, p. 112) Pri kromaj malfortaĵoj – kun gravaj sekvoj – de *Historio kaj klaskonscio* ni devas paroli poste.
 - 8 Kp Lukács 1984, p. 566, vd ankaŭ Lukács 1995, p. 32.
 - 9 Konciza, sed preciza superrigardo super la „programo” de la lukaĉa ontologio troviĝas en Benseler, Jung 2005, p. 483 sj, kaj iom pli detalaj germanlingvaj prezentaĵoj en Tertullian 1986 kaj Hahn 2001. Krome mi indiku la multnombrajn kontribuojn en Dannemann, Jung 1995.

Marksismo estas ĉi tie komprenata ne nur kiel (ekonomia) analizo de la kapitalismo, ankaŭ ne nur kiel kategoria imperativo konkludenda el la kritiko de la religio, nome „*renversi ĉiujn kondiĉojn*”, en kiuj la homo estas humiligita, servutigita, forlasita aŭ malestimata estulo”,¹⁰ sed kiel ampleksa mondpercepto, t.e. kiel histori-filozofia sistemo de mondklarigo, kiu metas la grandan projekton de la burĝa humanismo de liberiĝo kaj emancipiĝo de la homaro sur materiisman bazon.

La pariza filozofo Nicolas Tertulian¹¹ juĝas, ke pro tiu pretendo de la histori-filozofia sistemo la malfrua verko de Lukaĉo estas grandparte evitata aŭ rifuzata – ekzemple ĉe reprezentantoj de la frankfurta skolo, ekz-e Habermas¹² aŭ ankaŭ ĉe iamaj disĉiploj de Lukaĉo intertempe postmoderniĝintaj Ferenc Fehér, Agnes Heller, György Márkus, Mihály Vajda.¹³ Ilia kritiko resumeblas jene: ke la tempo de utopioj kaj de „grandaj rakontoj” en la tradicio de la historia materiismo pasis,¹⁴ tute en la senco de la poste de Fukuyama postulita „fino de la historio”.¹⁵ Sendepende de tio, ke eĉ la 1989 okazinta kolapso de la projekto socialismo ja ne signifis la finon de socialaj bataloj, kiu de tiam determinus la kapitalismon kiel lastan stadion de la homa evoluo,¹⁶ do sendepende de tio, Lukaĉo certe respondintus al siaj kritikantoj, ke la forlaso de integra, racia mondpercepto malfermas ĉiajn pordojn al la malraciismo resp. al la „malpura racio”.

La „ontologia ŝanĝo” en la marksismo, kiun Lukaĉo iniciatis,¹⁷ provas speciale rehonori la lokon de la subjekteco kaj de la individuo. En la unua volumo de la *Ontologio de la socia esto* Lukaĉo dediĉas sin – en la kadro de konstruado de sia instruo pri kategorioj – ĉefe al la artikigo de la socia onto-

10 Marx 1839-1844, p. 385, kursivigo en la originalo.

11 Kp Tertulian 2006, p. 30-33; germ.: Tertulian 2008.

12 Kp Benseler 1986, p. 747.

13 Kp Fehér k al. 1986a kaj Fehér k al. 1986b.

14 Kp Fehér k al. 1986a kaj Fehér k al. 1986b.

15 Fukuyama 1992.

16 Ĉi tie mi memorigu, ke Lukaĉo opiniis, ke eĉ la plej malbona socialismo estas pli bona ol la plej bona kapitalismo (kp Lukács 1969, citita laŭ Eörsi 1981, p. 10 s.) Malgraŭ ĉiaj rezervoj li konsideris la socialismon kiel historie paŝon antaŭan, ĉar en ĝi la ekonomia bazo de ekspluatado estis grandparte forigita – kvankam ĉe tio estas nur tre limigite io dirita pri la grado de daŭra fremdiĝo.

17 Benseler 1995.

logio kun ĝenerala natur-ontologio (ilia tranĉpunkto estas la respektivaj centraj kategorioj teleologio kaj kaŭzeco¹⁸ kaj al la filozofi-historia deduktado de materiisma ontologio (kun dislimigo disde la ekkonteorie-logike dominata filozofio kun la neceso kiel centra kategorio kaj en laŭspurado de la elformiĝo de la ontologio de Hartmann kaj Hegelo ĝis Markso, kun la esto kiel centra kategorio). En la dua volumo la argumentado pri „la plej gravaj problemkompleksoj” iras de la laboro „kiel prafenomeno, kiel modelo de la socia esto”,¹⁹ tra la reproduktado al la ideologio kaj fine – kiel „krona fino”²⁰ – kondukas al la ĉapitro pri fremdiĝo. Ĉe tio, ankaŭ laŭ Lukaĉo, la religia fremdiĝo estas la pratipo de ĉiaj precipe ideologie perataj fenomenoj de fremdiĝo.²¹

Tri ekzemploj de kontraŭeca diskuto de la nocio de fremdiĝo

Tamen, la marksisma diskutado de la nocio de fremdiĝo okazas ne sen kontraŭeco. En la sekvo estu nomataj almenaŭ tri teoriaj temaroj de tiu kontraŭeca diskuto: *Unue* la kompleta rifuzo de la fremdiĝ-nocio en la tradicio de la teoria kontraŭhumanismo kaj de la kontraŭhistoriismo de Althusser.²² Repreno de la strukturisma rifuzo de la fremdiĝo troviĝas ĉe

18 Vd precipe la klarigojn en la *Prolegomena*, kp Lukács1984, p. 7 sj.

19 Lukács 1986, p. 10.

20 Tertulian 2006, p. 30.

21 Kp Lukács1986, p. 605. – En pluraj lokoj de la *Ontologio* kaj ankaŭ de la *Eстетiko* Lukaĉo diskutas la esploradon de la fremdiĝo kaj speciale de la religio kiel fenomeno de fremdiĝo el ontologia perspektivo (kp precipe Lukács1963b, p. 675 sj kaj 775 sj, Lukács1984, p. 193 sj kaj 398 sj kaj Lukács1986, p. 501 sj.

22 Kp Althusser, Balibar 1972, p. 158. Lukaĉo ankoraŭ mem polemikas kontraŭ tiuj – ne malfacile identigeblaj, ankaŭ sen ke li donis la nomojn – adeptoj de la Althusser-a strukturismo, kiuj „konsideras la problemon de fremdiĝo speciala demando de la juna (ankoraŭ filozofia) Markso, trans kiu la matura 'ekonomikisto' transpaŝis” (Lukács 1986, p. 503). Li citas ekz-e el la marksaj „*Teorioj pri la plusvaloro*” pri la plialtiĝa evoluo de la individueco kaj de la homa specio sub ofero de la individuoj (kp Marx 1863, p. 111), kiuj el lia vidpunkto pravas, ke ankaŭ la supozata „pure ekonomikista-sciencista” Markso estas teoriulo de la fremdiĝo, kiu konsistas en la progresanta evoluo de la objektiva flanko kun samtempa perfortado de la subjektiva flanko (kp Lukács 1984, p. 1993). Tertulian

Heinrich 2006 kaj en mildigita formo, laŭ kiu la fremdiĝo estas malklara nocio, „kiun oni ne fidu”, en la *Kritika vortaro de la marksismo*.²³ Due la reduktado de la fremdigaj fenomenoj al antaŭsocialismaj kondiĉoj en la landoj de la reala socialismo,²⁴ kaj *trie* la tradicia linio de la „okcidenta marksismo”, kiu vidas en la influhava frua verko de Lukaĉo, *Historio kaj klaskonscio*²⁵ (de la jaro 1923) unu el siaj fondaj dokumentoj. Tio estas ĉefe reprezentantoj de la Frankfurta Skolo, ekz-e Habermas, aŭ de la ekzistad-

eĉ kuraĝas tezi, ke surbaze de pliaj resendoj (ekz-e al la „specieco per si mem” en *La kapitalo*) la „epistemologia rompo” de la Althusser-a marksismo ricevis fortan baton, de kiu ĝi ne resaniĝos (kp Tertulian 2006, p. 36 s.; pri detala kritiko de la reduktado de la fremdiĝ-nocio al la marka frua verkaro kp ankaŭ Sève 1974).

- 23 Kp Labica 1984, p. 300. Michael Heinrich bazas sian reprenon de la teorio de koncepta rompo ĉe Markso (teorio kiu rifuzas la fremdiĝ-problemaron) sur sian centran tezon, laŭ kiu ankaŭ la marka esencofilozofio restas sur la teoria kampo de la „individuismo” de la burĝa ekonomiko. Laŭ la paradigmo de la „individuismo” la sociaj strukturoj devenas el la interna esenco de la individuoj (ekz-e interalie interpreteblus, ke la konkurencosocio devenas el la – en ĉiu homo enaskita – egoismo). La esencofilozofio de Markso – tie kie ĝi entute ankoraŭ aperas ĉe la matura Markso – restas nun, laŭ Heinrich, ambivalence, fidela al tiu „individuismo”, kiun li ja ĝuste intencis superi pere de sia *Kritiko de la politika ekonomio* en Kuhn-a scienca revolucio (kp Heinrich 2002, p. 31 sj).

Laŭ Lukaĉo, Heinrich per sia tezo de ambivalenco de la marksaj bazaj kategorioj provas – pravigeble – sekurigi la „veran kernon de sia esplorprogramo” per fortaj helphipotezoj (kp Lakatos 1982), dum Popper supozeble riproĉus al li praktiki nepermesitan imunig-strategion por sia teorio (kp Popper, Hansen 1994). Laŭ la ambivalenc-teorio de Heinrich, Markso restis ankaŭ post sia „revolucia” rompo en multaj punktoj ligita al la teoria kampo de la (nov-)klasika ekonomiko: Do, se eĉ ĉe la matura Markso troveblas „restaĵoj” de fremdiĝ-diskurso respektive de homa speci(ec)o, tiam (en tiu teorikoncepto) tiaj ekzemploj, vide al la malkonsekvenco de Markso, pruvas, laŭ Heinrich, nur ties (supozatan) ambivalencecon, sed tute ne la kontinuecon de la fremdiĝ-tezo en la verkaro de Markso, asertatan de Lukaĉo (kaj aliaj). Sed pli gravas – kaj ĉi tie certe regas unuanimeco kun Heinrich – ol la demando de la ĝusta Marks-interpreto tiu de la taŭga analizo de la socio, por kiu la *Ontologio de la socia esto* de Lukaĉo donas metodon de profunda kaj ampleksa klarigo. Tute malproksima de la „metoda individuismo” de la ĉefa tendenco de la burĝa sociscienco – de kies centra paradigmo de la „*homo economicus*” oni atendu ne pli da realec-enhavo ol de la kristana mito de

ismo, ekz-e Sartro.²⁶ Dum ĉe la du unuaj interpretoj de la fremdig-nocio temas pri marĝenigo de la fremdigaj fenomenoj, la lasta, male, distingiĝas per ilia trodimensiigo: fremdiĝo estas altigita al eterna homa kondiĉo („*condition humaine*”).

La nocio fremdiĝo: de Hegelo ĝis la juna Lukaĉo

Estas vere, ke la matura Lukaĉo emfazas la „decidan signifon” de sia junecverko *Historio kaj klaskonscio* ĝuste en rilato al la kategorio de fremdiĝo, kiu estas tie „unufoje post Markso traktata kiel centra demando de la revolucia kritiko de la kapitalismo”.²⁷ Sed li skribas, ke en tiu skribaĵo la

la Sankta Manĝo – la matura Lukaĉo deduktas nek la ĝeneralajn sociajn strukturojn nek la kategoriojn – (historie evoluantajn en reciproka kondiĉeco) kiel fremdiĝo, (disvolviĝanta) personeco kaj homa speciecio ktp – el la (donita) interna kondiĉo de la individuoj. Tamen la *Ontologio de la socia esto* taskas sin disvolvi materiisman subjekteorion, kiu faras la teleologian agadon de la homaj individuoj centra punkto de la (memkreita) socia esto.

24 Lukaĉo turnis sin kontraŭ la „stalinisma” sinteno, laŭ kiu la nura enkonduko de la socialismo superas la fremdiĝon (kp Lukács 1986, p. 551). Ekz-e en la *Filozofia vortaro* (*Philosophisches Wörterbuch*) de la GDR [Germana Demokratia Respubliko] la fremdiĝo estis reduktita al pure kapitalisma fenomeno (kp Buhr k al. 1975, p. 326), kies aplikadon al socialismaj kondiĉoj transformas ĝin en „abstraktan, nehistorian kategorion” (Buhr k al. 1975, p. 330). Kaj la nocio de aĵigo, ĉe Lukaĉo centra pera kategorio de la fremdiĝo, estis tie eĉ tute ne menciita.

25 Germane: *Geschichte und Klassenbewußtsein*. -v1

26 Pri la akceptohistorio kp Tertulian 2005a kaj Tertulian 2005b.

27 Kp Lukács 1968b, p. 24, vd ankaŭ Eörsi 2005, p. 112. Tertulian, en sia enkonduko al la franca eldono de la lukaĉa verko *Dialectique et spontanéité* (*Dialektiko kaj sponteco*, 2001) nomas kiel kromajn gravajn atingojn de la fama junecverko, kiun Lukaĉo strebis konservi por la daŭro, kvankam sur ontologia bazo, i.a. la daŭreman kontraŭnaturalismon ĉe la interpretado de la socia esto, la potencon revalorigon de la hegela dialektiko, la klaran historiecon de la kategorioj kaj la neredukteblo de la praktiko (kp Tertulian 2001, p. 16 s.). La skribaĵo, dum longa tempo malaperinta en arĥivoj, *Ĥvostismo kaj dialektiko* (originale: *Chvostismus und Dialektik*) (1925), en kiu Lukaĉo defendis sian verkon *Historio kaj klaskonscio* kontraŭ la rektaj atakoj de la 3-a Internacio, speciale de Deborin

kompreno de la fremdigo restas „pure en la hegela spirito” idealisma, ĉar ĝia „lasta filozofia bazo” estas „la en la historia procezo realiĝanta identa subjekto-objekto” de la proletaro. Tiu „pure metafizika konstruaĵo” de la identa subjekto-objekto estas „superhegelado de Hegelo”, kiu intencas „objektive superi la majstron mem en aŭdaca pensa leviĝo super ĉia realaĵo”.²⁸

Ĉe Hegelo la fremdiĝprocezo en la evoluhistorio de la homa spirito estas ĝia eksteriĝo en la konkretiĝo kaj la nuligo („*aufhebo*”) de la fremdiĝo per la subjekto-objekto-identeco en religio (en la imago) kaj filozofio (en la nocio).²⁹ Ĉe la juna Lukaĉo fariĝis el tio la superado de la fremdiĝo per la – fikcia, kiel la malfrua Lukaĉo poste diris – subjekto-objekto-identeco en la partio kaj en la revolucio. Fiktiva, ĉar unuflanke en la reala mondo – mal same ol en la idealisma mondo de la absoluta spirito ĉe Hegelo – ne povas – aŭ en la plej bona kazo povas nur metafore – ekzisti kunfandiĝo de subjekto kaj objekto, kaj aliflanke fremdiĝo egaligita kun konkretiĝo ne estas forigebla – escepte se oni forigas la homon mem. Speciale tiu „fundamenta kaj maldelikata eraro” de egaligo de fremdiĝo kaj konkretiĝo certe „multe kontribuis” al la sukceso de lia fama junecverko,³⁰ juĝas Lukaĉo mem en sia larĝe ignorita antaŭparolo de 1967 al la longan tempon prokrastita noveldo-no de *Historio kaj klaskonscio*.

Retrorigarde Lukaĉo juĝas sian verkon kiel esprimon de siaj „lernojaroj de la marksismo”,³¹ dum kiuj li restis ligita al la idealismo, ĉar la analizo de ekonomiaj-sociaj fenomenoj ne havis kiel elirpunkton la laboron.³² La kompleta aliĝo de Lukaĉo al la marksismo okazas nur dum sia restado ĉe la Marks-Engels-Instituto en Moskvo komence de la 1930-aj jaroj sub la

kaj Rudas en la revuo *Laborista literaturo* (germane *Arbeiterliteratur*), estis ja publikigita en Budapeŝto en la jaro 1996 (angla traduko sekvis en la jaro 2000), sed en Germanio ĝia kompleta publikigado ankoraŭ atendas. En Z 31 (septembro 1997) aperis la enkonduka paragrafo de la unua parto de tiu studaĵo (kp Lukács 1997) kaj en la *Lukaĉ-jarlibro* (orig. *Lukács-Jahrbuch*) 1998/99 la 2-a ĉapitro (kp Lukács 1999).

28 Kp Lukács 1968b, p. 25.

29 Kp Lukács 1986, p. 557.

30 Kp Lukács 1968b, p. 26.

31 Kp Lukács 1968b, p. 11.

32 Kp Lukács 1968b, p. 21.

„transformega impresio” – Lukaĉo parolas eĉ pri „ĥoko”³³ – kiun la remalkovritaj kaj en tiu momento ĵus komplete malĉifritaj marksaj *Ekonomiaj-filozofiaj manuskriptoj de 1844*³⁴ kaŭzis al li. Tiu nova Marks-leĝaĵo kolapsigis „ĉiajn idealismajn antaŭjuĝojn” de *Historio kaj klaskonscio*³⁵ kaj kaŭzis lian aliron al la ontologio, kiu pli ol 30 jarojn poste kondukis al lia filozofia ĉefverko, la *Ontologio de la socia esto*.

Konkretiĝo kaj fremdiĝo

Precipe la kompreno de Markso de la „konkreteco”³⁶ kiel primare materia eco de ĉiaj aĵoj kaj rilatoj³⁷ kaj de la konkretigo³⁸, de la konkreta estigado, kiel „natura ... maniero de la homa majstrado de la mondo”³⁹ ŝancelis la teoriajn fundamentojn de *Historio kaj klaskonscio*. Dum konkretigo apartenas do nedisigeble al la homo kaj en tio efektive konsidereblas kiel „eterna” homa kondiĉo (*condition humaine*), la fremdiĝo estas „speciala variaĵo”⁴⁰, kiun la matura Lukaĉo analizas (sekvante Markson) kiel historie sur certa evoluŝtupo de labordivido nur estiĝantan⁴¹ kaj por la homo principe supereblan fenomenon ligitan al certaj sociaj-historiaj kondiĉoj.

Sed, sekve al *Historio kaj klaskonscio*, ĉe reprezentantoj de la Frankfurta Skolo kaj ĉe Sartro kaj aliaj ekzistadistoj konstatablas tendenco kompreni la fremdiĝon kiel eternan ekzistadkondiĉon de la homo, kiel malklaran

33 Lukács 1968b, p. 38.

34 Marx 1837-1844.

35 Kp Lukács 1968b, p. 38.

36 Germane: *Gegenständlichkeit*, tradukebla ankaŭ per *aĵeco* (sed tiu estas pli precize la ekvivalento de la germana *Dinglichkeit*, laŭ *Ding = aĵo*) kaj *objektiveco*. En la sekvo mi tradukas jen per *konkreteco*, jen per *aĵeco*. Iam necesos trovi taŭgan solvon. -vl

37 Lukács 1968b, p. 38.

38 Germane: *Vergegenständlichung*, tradukebla ankaŭ per *aĵigo* kaj *aĵiĝo* (sed tiuj estas pli precize la ekvivalentoj de la germana *Verdinglichung*) kaj *objektiviĝo*, *objektiviĝo*. En la sekvo mi tradukas jen per *aĵigo/aĵiĝo*, jen per *konkretiĝo*. Iam necesas trovi taŭgan solvon. -vl

39 Lukács 1968b, p. 38.

40 Saml.

41 Lukács 1986, p. 509.

homan kondiĉon,⁴² (en la plej bona kazo) submetenda al konstanta ideologi-kritiko.⁴³ Lukaĉo vidas en tio daŭrigon de la jam de Markso kritikita sinteno de la maldekstraj hegeloj de la 1840-aj jaroj, laŭ kiu kompreno, travidado, senmaskigo ktp koncerne fremdiĝon estas samsignifa kun ĝia nuligo, dum en la realo ja fakte necesas ĝia praktika superado.⁴⁴ Por Lukaĉo la sama sinteno de la „unuarangeco de la pure teoria” aperas en la 20-a jarcento en nocioj kiel „ĵetiteco”⁴⁵, senideologiigo, provoko, hapeningo” ktp.⁴⁶

Malaprobante tiajn opiniojn, kiuj restas ligitaj al surfacaj simptomoj, Lukaĉo insistas pri la kapitalismokritiko de Markso kaj pri lia perspektivo de universala liberiĝo de la homaro. La marksismo donas ne nur ĝisfundan analizon de la sociaj kaŭzoj de ekspluatado kaj subpremado, sed krome metas al si la celon superi la fremdiĝon per la ĉiufanka emancipiĝo de la homa personeco: La komunismo, komprenata kiel la komenco de la vera historio de la homaro, estas en la *Manifesto de la Komunista Partio* proklamata kiel socio, „en kiu la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la

42 Lukács 1968b, p. 26.

43 En simila kunteksto Lukaĉo kritikis ankaŭ la pozicion de la ekzistadismo en la sekvo de Heidegger kaj de Niĉeo, kiu proklamas la morton de Dio, kiel „religi-an ateismon kiu devigas al nenio” (Lukács 1986, p. 655) – kiu ja ne bezonas dion, sed alie havas trajtojn de kvazaŭreligia antaŭdestineco al eterna homa fremdiĝo.

44 Lukaĉo rifuzas la reduktion de fremdiĝo kaj aĵiĝo (konkreteĝo) al nur konsciaj fenomenoj respektive al nur malĝusta pensado pri la homo (kp Lukács 1986, p. 642 s.). Ankaŭ tiuj kategorioj estas nur duavice – ĝustaj aŭ malĝustaj – spegulaĵoj en la konscio, sed unuavice realaj procezoj. Simile montras Heinrich, kial la kompreno de la marka fetiĉ-nocio ne sufiĉas (kp Heinrich 2004, p. 71 s.). Sed ke Heinrich, same sub la konsci-aspekto, rifuzas egaligi ideologion kun malĝusta konscio (kp Heinrich 2004, p. 71 s.), kion praktikas ekz-e la Frankfurta Skolo, estas problemeca. Sen povi ĉi tie pritrakti tion en necesa detaleco, mi tamen mallonge nomu la principan pozicion de Lukaĉo pri la ideologi-nocio (kp Lukács 1986, p. 397 sj.): Kvankam ideologioj efektive estas konsci-fenomenoj, la nur kritika uzado de la ideologi-nocio kiel ideo, kiu falsas la realon, tamen pritrancas la marksan vidmanieron, ĉar principe ĉia homa esprimo estas ideologikapabla. Kiel Lukaĉo montras en la diskuto pri al ideologi-nocio de Gramŝo (orig.: *Gramsci* [elp. grāmŝi] -vl), la kriterio de ideologieco ne estas la nura enhavo de ajna penskomplekso, sed ĝia funkcio en donitaj sociaj konfliktoj.

45 Germane: *Geworfenheit*. -vl

46 Kp Lukács 1986. 563 s.).

libera evoluo de ĉiuj”.⁴⁷

De la religikritiko al la kritiko de la fremdigaj kondiĉoj

Por Markso ĉia kritiko komenciĝas per la kritiko de la religio, kaj ne nur en la senco de kompreno de religio kiel rapidkonkluda „klarigo” de io ne-komprenato, ekz-e de fulmo, morto ktp – tiu estas la ĉefa tendenco de la materiisma tradicio ekde la antikveco –, sed ĝi estas kritikata kiel anstataŭigo de memrealigo: La homoj fuĝas en fantazian formon de memrealigado, ĉar la ekzistantaj kondiĉoj ne ebligas realan memrealigon.⁴⁸ Lukaĉo montras, ke Markso transiras la fojerbaĥan kritikon, laŭ kiu la homo kreas la religion kaj ne inverse Dio la homon: La kritiko de la religia fremdiĝo kiel „malĝusta⁴⁹ mondkonscio” estas kompletigenda per la kritiko de la malĝustaj sociaj rilatoj. La efektiva memrealigo eblas nur trans la kadro de la kapitalisma moderno. Ties ontologia rilatpunkto ne estas la idealista „civitano” („*citoyen*”), sed la reala socia „homo” („*homme*”), la burĝa egoisma homo: la aliulo, la socio, la specia estulo ne prezentas eblecon de memrealigo, sed estas baro, malhelpo kaj konkurencanto.⁵⁰

Markso vidas en la nehistoria sinteno de Fojerbaĥo⁵¹ esencan kaŭzon de tio, ke li ne povis ekkoni la sociajn kondiĉojn de superado de la fremdiĝo ĝenerale nek de la religia fremdiĝo. Por Markso fine nur la praktika sperto de la homa estulo en la komunismo superfluigos la teorian demandon pri la transviva estaĵo. Ĉe tio, la ekkono de la historio de la homo kiel memkreiĝo per laboro estas la teoria bazo de nuligo de la religio. Pro tio, Markso tute ne deklaris la religion ĉefa malamiko, kiun necesas malaperigi el la mondo per kontraŭreligia batalo.⁵² Anstataŭ superi ĝin, tiu burĝa ateismo restas kiel

47 En Esperanto: Markso-Engelso 2011, p. 68; en la germana: Marx, Engels 1846-1848, p. 482.

48 Kp Marx 1839-1844, p. 378.

49 En la germana: „*verkehr*”, kio signifas samtempe *malĝusta* kaj *inversigita*. -vl

50 Kp Lukács 1986, p. 561.

51 Kp Marx, Engels 1845-1846, p. 45.

52 En tio oni devas konsenti kun la evangelia teologo Meyer, ke la marka kritiko de la religio ne celas ties „platan forigon” kaj ke oni ne povas „science” forinter-

lasta „ŝtupo de la teismo, de la negativa agnosko de Dio”⁵³ ankoraŭ ligita al la medio de la religia fremdiĝo.

La fremdiĝnocio ĉe Lukaĉo

Lukaĉo transprenas de Markso la strikte historian alirmetodon al ĉiaj fenomenoj de la realo. Li ofte memorigas pri la eldiro de Markso, ke envere ekzistas nur unu scienco, nome tiu de la historio⁵⁴ kaj ke oni povas kompreni fenomenon, kaj des pli socian, nur se – kaj tiom ke – oni komprenas ĝian estiĝon, do ĝian estiĝintecon.⁵⁵ Tiu historia metodo stampas ankaŭ lian

preti la en ĝi esprimatan „suspiro de la premata kreitaĵo” (Markso) aŭ eĉ ŝtate malpermesi” (kp Meyer 2007, p. 87 s.). Sed oni ne povas vere konsenti al lia arbitra interpreto, laŭ kiu la „materiisma esplorado” de Markso estas ankaŭ „kritika teologio” (kp Meyer 2007, p. 89) – ne nur pro la, milde dirite, larĝanima interpreto de piednoto en la marka *Kapitalo*, kiu laŭŝajne pruvas la teologian aliron. Ĉe la ideologia disputo inter (idealisma) religio kaj (materiisma) marksismo temas ĝuste ne nur pri „laŭdira” neakordigeblo, kiel Meyer supozas, (kp Meyer 2007, p. 87) sed pri fakta „neakordigeblo en la mondpercepto”, ĉe kiu Lukaĉo ne vidis agospacon por konverĝo. (kp Lukács 1987, p. 26) – sed kiu estas ja akordigebla kun la de la liberiga teologo Meyer postulata „senkondiĉa solidareco” (Meyer 2007, p. 87) inter marksistoj kaj progresemaj kristanoj en la ĉiutagaj politikaj bataloj. (Kp ankaŭ Lukács 1987, p. 41).

53 Marx, Engels 1844-1846, p. 116.

54 Kp Marx, Engels 1845-1846, p. 18.

55 Kp ekz-e Lukács 1984, p. 35 s. kaj 562, vd ankaŭ Benseler, Jung 2005, p. 483. Li skribas, ke la nehistoria aliro, male, malebligas veran komprenon de la socia, kiel ĝenerale ĉia esto, kaj estigas aĵigajn imagojn resp. – en la marka esprimaniero – fetiĉigojn. Li koncedas, ke tamen jam en *Historio kaj klaskonscio* li malĝuste uzis *aĵigon (konkretigon)* kiel sinonimon de *fremdiĝo* (kp Lukács 1968b, p. 27) – ankaŭ tiu estis eraro kun granda efikeco. Longe antaŭ la estiĝo de la fremdigaj fenomenoj – ligite kun la historia elformiĝo de la homa personeco (kp Lukács 1986, p. 639) – „senkulpaj” aĵigoj, kiel ekz-e en la lingva nomado, apartenas al la homa formo alproprigi la realon, kiuj ankaŭ sur pli alta homa evolunivelo ne nepre kondukas al fremdigaj aĵigoj (kp Lukács 1986, p. 579). Sed kontraŭe al la tragedie mistikigaj aĵig-teorioj (ankaŭ forte influitaj de la juneca verko de Lukaĉo) la matura Lukaĉo trovas en la fiksiga, aĵeca kompreno de la fakte universale procezeca mondo la kernan elementon de la aĵigo. Al tiu jam en la ordinara konscio (necese) farata reduktado de la aĵoj al ilia

nocion de fremdiĝo. La procezeco de la socia esto klare aperas, kiam li priskribas la fremdigon interalie kiel kontraŭecon inter la multigo de la ecoj kaj kapabloj kaj ilia kunigo en sintezan unuecon de la personeco.⁵⁶ Kvankam ankaŭ Lukaĉo jam parolas ekz-e pri skipaj specialistoj („*Team-spezialisten*”), „ĉe kiuj la rafinite breditaj specialaj lertecoj efikas en plej alta grado personecdetruaj”,⁵⁷ tiu fenomeno estas hodiaŭ certe pli ofte observebla ol antaŭ 40 jaroj. Dum la rapido de alproprigo de kapabloj en la komputila epoko, de la atendo ke ĉiu teĥnike majstru sian medion, rapide altiĝas,⁵⁸ samtempe – en la plej bona kazo – stagnas la nivelo de la etika

apernivelo de la „rigidiĝanta aĵeco” li kontraŭmetas la ontologian nocion de la „procezeca aĵeco” [germ. „*prozessierende Gegenständlichkeit*”] de ĉio ekzistanta (kp Lukács 1984, p. 89 sj. kaj Lukács 1986, p. 576 sj.).

56 Kp Lukács 1986, p. 504 sj kaj 641 s. Lukaĉo emfazas, ke la fremdiĝo estas multeca kaj multnombra socia fenomeno, kies elementoj ekzistas relative sendepende en unu sama homo kaj eĉ povas konflikti inter si. Li nomas ekzemple la kazon ofte observeblan en la laborista movado, ke (viraj) laboristoj kontraŭbatalas sian fremdiĝon kiel tian, sed samtempe tiranece fremdigas siajn virinojn kaj per tio elmetas sin al kroma memfremdiĝo (kp Lukács 1986, p. 528 s.).

57 Lukács 1986, p. 504.

58 La kutima kritiko de la moderneco, kiu ofte kaj trafe prilumas la ombrajn flankojn de la socio, male celas prefere la teĥnikan kaj aĵan fremddeterminadon kaj fremdigon de la homo, en la senco de malkuplado de sistemo kaj vivmondo, kiu kaŭzas la ĝenon en la moderneco (kp Vellay 2012a). Tiu kompreno de fremdigo kaj aĵigo, deduktita el *Historio kaj klaskonscio* (kp Dannemann 1997, p. 108 sj) stampas ne nur la tradicion de la Frankfurta Skolo (Habermas 1981) ĝis hodiaŭ (Honneth 2005 kaj Jaeggli 2005), sed ankaŭ multe trans ĝi renkonteblas en la scienco, ekz-e ĉe Richard Sennett (Sennett 1998), kies intelekta evoluo estas ankaŭ stampita de la diskuto pri Lukaĉo, (kp Sennett 1982) kaj ankaŭ en literaturo kaj filmo, ekz-e en la romano *La valoro de la homo* [*Der Wert des Menschen*] (Emmanuel 2000), kiun Nicolas Klotz en la jaro 2007 filmigis sub la titolo *La Question humaine*. Tamen tiuj „tradici-linioj de kritika teorio, kiuj priskribas la modernigajn procezojn de ekonomia kaj neekonomia speco kiel kreskon de racieco kaj Pasion-historio”, (Dannemann 1997, p. 110) daŭrigas ankaŭ la malfortaĵojn de lia junecverko, speciale la jam en 1923 mankantanta distingon inter aĵigo (konkretigo) kaj fremdigo. Pro tio ili akcentas la fremd-determinadon de la homo per la strukturoj kreitaj „de la instrumenta racio”. Malantaŭ modern-eckritiko, kiu ofte romantikumas kaj centriĝas al teĥniko (kaj daŭrigas Rusoon), la decida dimensio de la fremdig-nocio kiel kapitalismokritika temo perdiĝas el la vido kaj estas – en la plej bona kazo – ĝis nereconeble ŝovita en la fonon.

senconado ligita kun tiurilataj socipolitikaj perspektivoj. La strikte historia-dinamika dimensio de la fremdig-nocio de Lukaĉo sensencigas la kuitiman objekton kontraŭ la fremdigo komprenata kiel devojiĝo el jam ĉiam premisita metafizika estulo de senŝanĝa substanco.⁵⁹ Referencpunkto de tia kompreno de fremdigo estus natura eco ennaskita en la (individua) homo respektive fiksa hombildo.⁶⁰ Tia imago de fiksa hombildo Lukaĉo certe kaj klare rifuzas kiel aĝigon, kiel fetiĉismon, kiu rigidigas la fakte dinamikan evoluon de la socia homo, same kiel la izolitan rigardon al la individuo. En sia (ampleksa) kategori-sistemo li pritraktas nek eston nek estiĝon nek specion nek ekzempleron kiel logikajn kontraŭec-parojn, sed kiel pensajn esprimojn de reale kunekzistantaj universalaj est-determinaĵoj.⁶¹

Ĉe li do ankaŭ la fremdigaj fenomenoj same kiel la homa specieco kaj personeco estas same produktoj de la evoluo de la homa socio, kiuj kun ĝi konstante plu evoluas. Ĉe tio li rifuzas unuflanke noción de naive meĥanika progreso, kiu deigas la teĥnikan pludisvolvadon de la produktadfortoj kiel solan kriterion de progreso kaj ĉe tio perdas el la okuloj la ne nuligeblajn naturajn bazojn de la homo kaj minacas ilin detrui.⁶² Li same argumentas aliflanke kontraŭ romantika idealigo de antaŭaj, supoze oraj kondiĉoj, kvan-

59 Kp Jaeggi 2004.

60 La imago de „homa naturo” kaj de el tiu deduktitaj „homaj bazaj bezonoj” kiel necesa referencpunkto por renovigo de la marka fremdig-koncepto estas nuntempe eksplicite konfesata de kelkaj aŭtoroj de la revuo *Actuel Marx* en Francio, ekz-e Yvon Quiniou kaj Tony Andréani (kp Quiniou 2006, p. 79 sj). Ĉe Quiniou tiu elemento de – volisme formulita – „marksisma” etiko iras sampaŝe kun la provo biologiisme dedukti homajn valorojn kaj moral-ideojn. Per tio li celas, referencante Darvinon, certigi la harmoniigeblon de materiismo kaj moralo (kp Quiniou 2002). El la lukaĉa vidpunkto li per tio maltrafas esencan trajton de la specifa novo de la socia esto. Lukaĉo siavice analizas en sia *Ontologio* – dislimante sin samtempe de meĥanikaj materiismaj kiel de idealismaj konceptoj – la estiĝon de valoroj (ĝis moralo kaj etiko) kiel socian procezon de la homa memkreiĝo bazanta sur la laboro (kp i.a. Eörsi 2005, p. 196).

61 Kp Lukács 1984, p. 40 s).

62 Ekzemple la senskrupula rab-ekspluatado de la naturaj vivbazoj, kiu ŝajnas okazi sub la maksimumo „fermu la okulojn kaj traen ... al la planeda varmigo”, interpreteblas kiel temo de la lukaĉa fremdigteorio. Tamen Lukaĉo supozeble insistus pri la specifa formo de la ekologia demando, kiun la kapitalisma profitmaksimumado donas al ĝi.

kam li konstatas ĉe iliaj reprezentantoj tre ofte ja klarvidan kaj mordan kritikon de la modernaj fremdig-fenomenoj.⁶³

Do, kun progresanta socia evoluo ja povas kongrui kreskanta grado de fremdigo, speciale en la formo de la relative novtempa memfremdigo⁶⁴: Ni pensu nur pri la fenomeno de grandparte enmemigita motivado kaj memstirado en la laborprocezo, ekzemple de inĝenieroj, per kio pli alta ekspluat-nivelo estas celata. La pli alta ekspluatgrado estas fakte la ekonomia esprimo de kreskinta memfremdigo. Tiu funkcias ĉe tio des pli senprobleme, ju pli konvinkita la koncernata inĝeniero kredas, ke lia memstirata altigo de produktivo servas envere al lia individua memrealigo.⁶⁵ Novliberalaj ideologoj kiel Richard Florida nomas tiajn tavolojn la nova, laŭdire hegemonia „kreema klaso”.⁶⁶ La altiĝo de la grado de memfremdiĝo en la supera segmento de la dungitoj iras ĉe tio sampaŝe kun la etendo de primitivaj fremdigformoj en la malsupra segmento de provizorigita dunglaboro, formoj, kiujn oni parte kredis jam superitaj.⁶⁷ Tiuj du kontraŭaj evoluoj, kiuj cetere prezentas aktualan ekzemplon por la lukaĉa tezo de la malsameco kiel tipa formo de soci-historiaj procezoj,⁶⁸ servas fine al la altigo de la ekspluatgrado.

Neceso ekzistas nur kondiĉite, neniam absolute

La lukaĉa koncepto de progreso celas la eblan evoluon de la *individua* personeco kiel horizonto de la *socia* evoluo. Li avertas tamen, ke oni ne

63 Lukács1986, p. 586 s.

64 Kp Lukács1984, p. 194.

65 Kvankam individuaj konsci-procezoj ludas gravan rolon en la fremdigoj, speciale ĉe la provo de ĝia superado, tamen la fremdigaj fenomenoj tute ne redukteblas nur al la subjektiva sento; fenomeno kaj sento estas ja ofte eĉ en kontraŭeca rilato inter si: la objektivaj vivsituacioj de sklavo, prostituito, proleto, inĝeniero aŭ ankaŭ kapitalisto ekz-e ankoraŭ ne donas rektan informon pri la subjektiva spertado de la respektiva socia pozicio, sed al ili ja kongruas specifaj, historie stampitaj fremdigkondiĉoj.

66 Kp Florida 2006.

67 Kp Altvater, Mahnkopf 2002, p. 81 sj.

68 Kp Lukács 1984, p. 178,

konfuzu la historian tendencon de la homa estulo evolui pli alten kun ia garantio aŭ eĉ absolute ennaskita neceso. Por Lukaĉo la meĥanisma materiismo de absoluta neceso en la stalina periodo – same kiel tiu de la dua internacio – estas mem rigidiĝanta aĵiĝo de la marksismo, aĵiĝo kiu estigas esencan kaŭzon de ĝia (provizora) fiasko.⁶⁹ Ĉe Markso tute ne ekzistis absoluta neceso, sed nur kondiĉita *se-tiam-neceso*,⁷⁰ kaj ĉiam nur la pensado en eblaj alternativoj. Lukaĉo memorigas en tiu kunteksto⁷¹ la teksteron en la *Manifesto de la Komunista Partio*, laŭ kiu en la klasbatalo la subpremata klaso povas fine esti venka – escepte se la batalo finiĝas per la perejo de ambaŭ klasoj.⁷² Sekve, laŭ Lukaĉo por la homaro lastinstance ja ekzistas estonteco nur en la komunisma socio, sed tiu ebla evoluperspektivo enhavas nenian aŭtomatismon, nenian potencon kiu absolute garantias la sukceson de tia evoluo.⁷³ En tiu senco Lukaĉo jam longe antaŭ 1989 kritikis la gurdatan formulon de la „neinversigebla venko de la socialismo”. Klera ontologia analizo de la realo povas, laŭ Lukaĉo, konstati principe nur kondiĉitajn leĝecojn; absolutaj necesoj apartenas laŭ li al aĵiga vidmaniero.⁷⁴

69 Kp Lukács 1986, p. 548.

70 Pri la ontologia evoluo de tiu kategorio kp Lukács 1984, p. 103 s kaj 151 sj.

71 Kp Lukács 1984, p. 179.

72 Kp Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: *Manifesto de la Komunista Partio* en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo komp. Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, ISBN 978-2-918300-45-8, p. 44 (en la germana eld.: Marx, Engels 1846-1848. 462).

73 Tiu rifuzo de la ideoj de absoluta neceso kaj de unueca kaj rektlinia progreso estas korelativaĵo de la rifuzo de ĉia historia teleologio kaj de transcendaĵo potencoj garantiantaj ĝian okazigon. Kvankam la socia evoluo baziĝas sur multaj teleologiaj unuopaj agoj de la individuoj, ekzistas nur „ekskluzive kaŭza procezo de ĉia historia okazaĵo, kiu en sia tutiĝo konas nenion teleologian” (Lukács 1984, p. 189).

74 Unu el la bazaj motivoj en la *Ontologio* de Lukaĉo estas la rifuzo de la metafizika antinomio de libereco kaj neceso en la homa agado (kp Lukács 1984, p. 328), kiu renkonteblas en la idealismo same kiel en la meĥanika materiismo. Kadre de la disvolvo de lia universala kategori-sistemo, interalie la modalkategorioj, li dediĉas sin ripete kaj detale pri la neceso (speciale ĉar ĝi estas la – absolutigita – centra kategorio de la religiaj ontologioj kiel ankaŭ de la ekkonteorie determinata idealisma filozofio ĝis la meĥanika materiismo en la „vulgarmarksismo”) kaj li argumentas por la naturo kiel ankaŭ pli forte por la socio la koncepton de se-

Transflankaj kaj ĉi-flankaj religioj de neceso

Dum la scienca-filozofia ontologio esploras la objektivan realon por malkovri la realan agospacon por la praktiko (de la laboro ĝis la etiko), la tradicia, religia ontologio eliras el provoj doni sencon por la propra (ĉiutaga) vivo de la unuopuloj kaj konstruas mondbildon, kiu promesas la kontentigon de la religia bezono.⁷⁵ En la religioj la sorto de la animo, do la esenco de la individua, aparta personeco, estas neeviteble determinata de la transcendantaj potencoj kaj la transmorta plenumado de la homo garantiita por la eterno. La panteismo de la renesanco, kiun Lukaĉo nomas transira filozofio, ja malaperigis la transcendan dion el la ontologio aŭ almenaŭ paligis ĝin ĝis komplete nerekonoblo.⁷⁶ Sed en ĝian lokon venis mondbildo de la *deus sive natura: dio aŭ ankaŭ naturo* (Spinozo), kiu anstataŭigas la dian determinitecon de la mondo per ties samspeca memdeterminado pere de la (absoluta) neceso.⁷⁷ La nova filozofio donis al la supreniĝanta burĝaro, kiu anoncis sian pretendon je regado, ideologian protekton, per tio ke ĝi donis al la nocio de (neevitebla) progreso la mondperceptan sankcion.⁷⁸

tiam-neceso (kp pri tio Lukács 1984, speciale en la *Prolegomena*: p. 74 s, 98 s, 103 s kaj 151 sj, kaj pri la rolo de la hazardo: p. 145 sj, sed ankaŭ en la ĉapitro pri Hartmann: p. 462 sj). Ekz-e la homa civilizacia procezo (cedo de la natura baro en la evoluo de la homa specieto) estas stampita de la universala disvolviĝo de la hazardo en la homa esto (kp Lukács 1984, p. 157). La ellaborado de la kontraŭeca interrilato de la ekonomia determiniteco „kun minaco de pereco”, kiu estas neniam klare kaj absolute „necesa”, sed ĉiam nur kondiĉita, kaj la konstantaj, neeviteblaj alternativdecidoj de la individuoj en la homa praktiko estas unu el la esencaj fortaj flankoj de la lukaĉa *Ontologio* (kp ekz-e Lukács 1986, p. 512 s kaj, en la kritiko de la dualisma versio de la marksismo, Lukács 1986, p. 298 s).

75 Kp Lukács 1984, p. 131.

76 Kp saml., p. 493 s.

77 Tiurilate ŝajnas pravigebla paroli pri religiaj trajtoj, kvankam oni atribuas absolutan neceson al ĉi-flankaj determinadoj de la homa sorto – ekz-e ĉe socialdarvinismaj konceptoj, ekz-e de socialbiologoj, sed same bone penseblas pri absolute determinismaj, ekz-e strukturismaj analizoj de la socio. Aktualan ekz-on de tia aĝiga neces-mondbildo liveris la dekstra-konservativa franca prezidinto Sarkozy, kiam li en la elektokampanjo provis kapti voĉojn per la tezo de ennaskita pedofilio, aŭ per tio, ke oni devas submeti infanetojn al testo por detekti ennaskitan krimemon (kp Fassin 2007).

78 Kp Lukács 1984, p. 146.

La lukaĉa nocio de specieco

Sed la fremdignocio ĉe Lukaĉo priskribeblas ankaŭ kiel kontraŭeco inter la evolunivelo de la „specieco en si mem” kaj de la postrestanta realigo de la „specieco por si”.⁷⁹ Ĉe la specia estaĵo li distingas inter la respektive atingita nivelo de la tutaĵo de la sociaj kondiĉoj – tio respondas al respektive atingita nivelo de la produktadfortoj kaj al la funkciaj atribuaĵoj ligitaj kun ĝi, kaj al la niveloj de postulo al la individuoj – kaj al perspektivo de pli alta evoluado de la homa personeco, entenata en la evolu-dinamiko mem, kvankam tute ne aŭtomata, en la evoluanta socio. La respektive atingitan nivelon Lukaĉo nomas „la specieco en si”, dum en la „specieco por si” aperas la emancipa perspektivo de la homa individuo, kiu fine realigeblas nur en la komunismo.⁸⁰

Sur ĉiu evolunivelo de la socio la homoj estas unue fiksitaĵoj al sia respektiva aparta rolo, al sia funkcio en la „specieco en si”. Samtempe la respektive atingita nivelo de la „specieco en si” malfermas eblecospacojn por konkretaj iniciatoj direktitaj al la „specieco por si”.⁸¹ Ekz-e la forigo de privata propio je produktadrimedoj estas nur la unua kaj ĝenerala bazo de komunismo, t.e. ĝi moviĝas ankoraŭ sur la ebena de la „specieco en si”. Celante trans tio al la „specieco por si”, al superado de la fremdiĝo, estas formoj de elformiĝo de la personeco, kiuj estigas konkretan kaj konscian interligitecon kun la homa specio.⁸²

La ideologia direktado al tuteca plenumado de la personeco en la konscia ligado de la persona sorto kun la homa specio, t.e. la direktado al la „specieco por si”, laŭ Lukaĉo, klarigas ankaŭ la efikecon kaj fascinon, en kelkaj kazoj daŭrantan dum jarmiloj, kiujn elstaraj eminentuloj kaŭzas al postsekvantaj generacioj.⁸³ Kiel ekzemplojn de tiaj eminentuloj li nomas i.a.

79 Kp ekz-e Lukács 1984, p. 193s. kaj Lukács 1986, p. 520 sj. Tiuj nocioj de Lukaĉo komprenendas kiel

80 Kp Lukács 1986, p. 519.

81 Kp saml., p. 529 sj kaj 592.

82 Kp saml., p. 648.

83 Kp Lukács 1984, p. 73, 189 kaj 207 kaj Lukács 1986, p. 615 sj. La daŭrema elradiado de grandaj eminentuloj same kiel grandaj arto kaj filozofio laŭ Lukaĉo klariĝas per ilia kontribuado al la alten-evoluado de la homa specieco, kiu enskribiĝis en la memoron de la homa specio (kp Lukács 1984, p. 73 s).

Sokraton, la mitan figuron Antigono aŭ ankaŭ Jesuon. Ĉe tiu lasta la tradicia marksisma religikritiko havas, laŭ Lukaĉo, blindan makulon, se ĝi analizas la kristanan mesaĝon nur sub la aspekto de la konata kritiko de la religio kiel opio de la popolo.⁸⁴ Tiu redukto al repaciĝema toleremo ne sufiĉas kaj, laŭ Lukaĉo, krome miskonas la profunde homaman kaj humanisman mesaĝon, kiu donas al la plenumsopiro de la individuoj perspektivon en la orientiĝo al la tuta homaro, t.e. direkte al la vera „spepcieco por si”. La franca marksisto Lucien Sève indikas, ke jam por la antaŭmarksisma ateismo la granda enigmo konsistis en la vigleco de la religio: Kiel eblas, demandas li, ke nur negativa fenomeno, simpla konsci-iluzio, povas disvolvi tiom historie potencon efikon?⁸⁵ Li diras, ke Markso per sia teorio de la ekonomia fremdiĝo kiel la historia matrico de la homa fremdiĝo ĝenerale, inkluzive de la religia fremdiĝo, klarigas ne nur ĝian estiĝon, sed precipe konsciigas pri ĝia reala enhavo, kiu konsistas el la (fremdigita) protesto kontraŭ la reala fremdiĝo.⁸⁶

La religio tenas la homon kaptita en lia aparteco

Tamen, laŭ Lukaĉo, la socia enhavo de la kristana mesaĝo, kiel ekzemple la komencaj sociaj esperoj de la malsupraj tavoloj je ĉi-flanka alidistribuado de la tera riĉaĵo – ligita kun la imago de la parusio, de la reveno de Kristo – estas principe misgvidataj per la savpromeso en la transmorta vivo. Tiuj esperoj esprimiĝis ekzemple en la postulo forpeli la

84 Kp Lukács 1986, p. 617. Tiel ekz-e la Filozofi-vortaro de la GDR taksis la kristanan instigon „Amu vian proksimulon kiel vin mem” ekskluzive kiel la provon sufoki la rezistadon de la ekspluatatoj kontraŭ trompo, perforto kaj maljusto en ĝeneralan homeco-nebulon (kp Buhr k al. 1975, p. 1052).

85 Lukaĉo kritikis ekz-e ankaŭ la banaligan esprimon de Kierkegaard, ke la ŝtato povas venke enkonduki ĉian ajn religion: Iom da mono kaj propagando sufiĉus, kaj post kelkaj generacioj anstataŭ la oficiala (mensoga) kristanismo trudiĝus same bone la kredo je la „luno el verda fromaĝo”. Kontraŭ tio Lukaĉo argumentas, ke nenia konduto ĝeneraliĝinta – ĉu profana aŭ religia – povas resti daŭre deviga, sen (sur la bazo de kia ajn dubindaj pravigoj) kontentigi socian bezonon (kp Lukács 1986, p. 568 s).

86 Kp Sève 1974, p. 216 s, vd ankaŭ Sève 2012.

komercistojn el la templo kaj kaŭzis la etendiĝantan influon de la plebaj frukristanaj sektoj. La prokraston de la parusio en nedevigan sentempan malproksimon donas aliflanke la bazon por la transformado de la jesuo-sekto en Israelo al mondeklezio de kristanismo.⁸⁷ La ĵiga imago de eterne daŭranta savado de la individua animo, t.e. de la esenca, vere homa estulo en la transcende garantiata postmortejo, rilatas kun la rigidiĝo de la individuoj en ilia respektive aparta personeco, kun la fiksa restado en la „specieco en si”. La ĉeftendenco de la religio do konsistas, laŭ li, ĝuste en enbarado de la homoj en ilia aparteco.⁸⁸

Evoluistorie⁸⁹ la religio estiĝas nun el la laboranalogia imago de rekta influado de la ankoraŭ nekomrenataj naturpotencoj en magio: El la sperto de la teleologia strukturo de la laboro elkreskas la kredo, ke eblas per magia influado ekz-e estigi pluvon. Ĉe tio, laŭ Lukaĉo, la magio ja estas formo de aĵigo, sed ankoraŭ ne fremdiga formo, ĉar en tiu komenca stadio de la homa evoluo ankoraŭ ne okazis elformiĝo de vere individua personeco.⁹⁰ Antaŭ la fono de kreskanta kompleksogrado de la socio montriĝas la transiro de magio al religio per la anstataŭigo de tiu laboranalogia imago de rekta influado de la natura (kaj pli kaj pli ankaŭ socia) medio. Anstataŭe oni kvazaŭ interŝaltas diojn, kies favoron necesas akiri per preĝadoj, oferoj ktp.⁹¹

Pri la origino de personeco kaj de fremdiĝo

Tiu procezo iras sampaŝe kun la elkreskado de la homo el la ennaskita, protekte-sencdona prakomunumo. Nur post dissolviĝo de la polis-kulturo – en la poliskulturo la „popola prospero” estis prioritata – la vivo privata fariĝas la sola estmaniero de la unuopaj homoj. Per tio al la unuopulo

87 Kp Lukács1986, p. 609 sj.

88 Kp saml., p. 592 sj.

89 Ĉi tie nur aludeblas la ampleksaj klarigoj de Lukaĉo pri al evoluistorio de la religio, al la ŝanĝiĝanta rolo de la religio en rilato al la evoluanta homa specieco kaj al la nokia distingo de eklezio, sekto kaj herezulmovado ktp (kp Lukács1986, p. 555 sj kaj Lukács1963b, p. 775 sj; pri la distingo de la kredo en la ĉiutaga vivo, en magio kaj en religio kp Lukács1963a, p. 118 sj).

90 Kp Lukács1986, p. 639.

91 Lukács1986, p. 576 sj.

trudiĝas prioritata la demando pri la senceco de la individua vivo.⁹² La religio kiel praformo de la ideologiaj fremdig-fenomenoj bazas sur la imago de teologie metita mondirado, al kiu la aparta sorto de la unuopulo estas neeskapeble submetita. La persona sorto de ĉiu kredanto en tiu mondbildo estas nodpunkto en la transcende determinata esto. La realo estas komprenata kiel esprimo de pli alta providenco, speciale vide al dolaraj okazaĵoj kiel ekzemple la morto de proksimuloj. Filozofie tio signifas, laŭ Lukaĉo, ekskludi la hazardon el la objektiva realo kaj krome interpreti tiun realon egocentre. La religio per tio eternigas la strukturon de la mi-rilateco de la ĉiutaga vivo – tio fariĝas aparte klara en la astrologio –, ĉar la propra persono estas komprenata kiel centro de la teleologie determinita mondirado.⁹³

Ordofunkcio kaj opio de la popolo

La eklezio – malsame ol sekto kaj herezomovado – plenumas unue ordan funkcion por reguligi la ĉiutagan vivon, kiu estas tamen iom post iom transprenata de ŝtataj resp. profanaj institucioj. Aldoniĝas strukturkonservativa funkcio de la religio, kiu esprimiĝas ankaŭ en la diro „*opio de la popolo*”⁹⁴: La orientiĝo al la postmorta transejo – kiu garantias eternan kaj perfektan plenumadon – kiel la vera realo nepre malaltigas la valoron de la ĉi-mondaj provoj eskapi el la ĉi-viva „specieco en si” kaj per tio la ideologia batalo kontraŭ fremdigo kaj memfremdiĝo estas malfortigata.⁹⁵

Tri vojoj el la fremdiĝo: scienco, arto, etiko

Kontraŭ tio, Lukaĉo vidas en scienco, etike motivata konduto kaj arto tri formojn de ebla altiĝo de la homo super sia rekta aparteco⁹⁶: *Unue* jam la

92 Kp Lukács1986, p. 589 s, pri la koncepto de la historie elformiĝanta homa personeco vd ankaŭ: Lukács1986, p. 192 sj.

93 Kp Lukács1963b, p. 781 sj.

94 Marx 1839-1844, p. 378.

95 Kp Lukács1986, p. 618 s.

96 Kp Lukács1963b, p. 726 s. k 776 sj.

ĉiutaga evoluo mem postas kun si nepre almenaŭ partan superadon de la aparteco, ĉar ĝi devigas tendece al objektiviga ekkono de la mondo. La scienco metas tiun tendencon sur sisteman bazon. La scienco, laŭ Lukaĉo, estas karakterizita ĝuste de metodo malantropomorfiga, kiu celas objektivan mondekkonon kaj kiu nepre transiras la apartecon de la individuoj. *Due*, laŭ Lukaĉo, ankaŭ etika konduto – la „hejmeca sento en la vivo mem, la senkondiĉa dediĉemo al ideo destinita por tiu ĉi vivo”⁹⁷ – distingigas per la proksimiĝo de la individuoj al homara starpunkto, en kiu ili sukcesas elformi konkretan kaj konscian rilaton al la specio. *Trie*, per la (antropomorfiga) arto, en la *katarzis*-sperto – la emocia 'skuiĝo' kaj 'puriĝo' ĉe la kreado kaj ĉe la akceptado de artaj verkoj – la homo povas leviĝi super sian apartecon kaj esti rilaton de la propra sorto kun tiu de la specio. Ĝuste tio estas laŭ Lukaĉo la centra trajto de „granda arto”.⁹⁸

Tamen tiuj tri ebloj de plenumado de la prava sopiro je plena disvolvo de la homa personeco estas ofte baritaj de la socia realo. Tiam la individuoj kripliĝas aŭ rigidiĝas en sia rekta aparteco, kun la frustracioj kiujn tio kaŭzas, aŭ ili fuĝas en religian sublimiĝon kun la promeso de transmorta savado de la individua animo. La malfacilaĵoj de la ĉiutaga vivo ĉe la realigo de la deziro je plensenca vivo fariĝas do konstanta bazo de sponta estiĝo de religia bezono.⁹⁹

Renoviga bazo de la religia bezono

La religia bezono estas laŭ Lukaĉo en nedisŝirebla interligiteco kun la aparta persono de ĉiu homo. Ĝi direktiĝas al la senĉonado kaj al la gravigo de la spertoj de la aparta homo, al la savo de la aparta animo fare de transcenda potenco, ĉe kio la transmorta sublimita esto ŝajnas esti la vera, la pli reala, pli alta kaj pli digna esto. La religia bezono en sia origina formo estas do, laŭ li, io unuavice individua: la aparta homo serĉas savon de sia animo, kiun liaj faktaj, objektivaj kaj subjektivaj vivkondiĉoj ne ebligas al li. Sed la speco de elformiĝo de la religia bezono estas determinata socie,

97 Lukács1963b, p. 727.

98 Kp Lukács1986, p. 620 sj.

99 Kp Lukács1963b, p. 726 s.

kvankam tre riĉaj variaĵoj.¹⁰⁰

Jam en la procezo de la historia estiĝo de la religio la religia bezono nutras sin el nekontrolataj afektoj, kiuj estiĝas el la malcerteco rilate al la nekomprenebla medio. La (pli aŭ malpli granda) „rondo de nekkoneblo”, kiu dekomence akompanis la teleologiajn metojn en la laboro, esprimiĝas en la espero je sukceso resp. timo antaŭ la sekvoj de malsukceso. Sed tio estas tute ne nur preterpasa evolukondiĉo de la homa ekzistado. En la laboro kiel ĝenerala antropologia ekzistadkondiĉo de la homo kun la teleologiaj metoj kaj la kaŭzaj procedovicoj renkontiĝas malhomogenaj realec-procezoj. Ĉar estas principe malebla komplete kompreni la kompleksecon de la kaŭza totaleco, okazas principa (pli aŭ malpli granda) malkongruo¹⁰¹ inter la alstrebitaj celoj, kiuj estas la bazo de la celmetaj decidoj de la individuoj, kaj la faktaj rezultoj de ilia agado en la totaleco de ĝiaj efikoj.¹⁰²

100 Kp Lukács1963b, p. 780 sj.

101 Eblaj negativaj sekvoj pro la principa maleblo komplete anticipi la sekvojn de la homa agado estas larĝe disvastiĝinta motivo de filozofia pensado. Ekz-e Sartro pritraktas ilin sub la termino de „*contrefinalités*” (kp Sartre 1960, p. 233 s, citita laŭ Tertulian 2005a, p. 69), kaj en la etiko de la franca filozofo Morin ili ludas centran rolon kiel „malcertec-principo” (*principe d'incertitude*) en lia „ago-ekologio” (*écologie de l'action*) (kp Morin 2006, p. 40 sj). Ankaŭ en la kognosciencoj la koncepto ludas esencan rolon (kp ekz-e Dörner 2002).

102 Kp ekz-e Lukács1984, p. 9 kaj 13. En la Lukaĉ-akceptado oni ĝenerale ekkonas la principan malkongruon de celmetaj individuaj decidoj kaj la totaliga socia finrezulto kiel bazon de fremdiĝo. Tamen ĉi tie la diablo troviĝas en la detalo: Dum Tertulian formulas prudente, ke pro tio „la totaleco povas mem direktiĝi kontraŭ la origine sekvataj projektoj” (kp Tertulian 2006, p. 36, germ. Tertulian 2008), Dannemann klare (eble tro) pintigas tiun penson, kiam li en la „nenuligebla de la dialektiko de teleologio kaj kaŭzeco” vidas „kvazaŭ neelĉerpeblan fonton de fremdiĝo”. Li aldonas, ke la „rezultantaj regulecoj kaj kaŭzeco entenas ĉiam ankaŭ elementon de memstariĝo” (kp Dannemann 1997, p. 92). La modernec-kritika Lukaĉ-legado de Dannemann, forte stampita de la retoriko de aĵigo el Historio kaj klaskonscio, vidas en ties Ontologio la „ĉie ĉeestan fremdiĝon kaj aĵigon” pruvita (kp Dannemann 1997, p. 91). Restas la demando, ĉu ĉi tie ne minacas deglito en mitfaradon, en kiu – en propraj vortoj de Lukaĉo (Lukács1986, p. 636 s) – „la fremdiĝo estas prezentata kiel mallume pesimisma homa kondiĉo (*condition humaine*) kiel nesuperebla naturstato de la homo”? Kie kiel karakteriza trajto de la moderna socio oni deklaras la (fremdigajn) aĵigojn kiel parton de ĉie ĉeesta sistemlogiko, al kiu la moderna

La principa maleblo superrigardi ĉiujn konsekvencojn de nia agado fariĝas tiel, tra la senta malcertiĝo, daŭran eblan renovigo-bazon de la religia bezono.¹⁰³

Epikuree kontraŭ imo kaj espero

Tamen Lukaĉo taksas ebla cediĝi la regantan influon de la afektoj al la mondrigardo de la homo pere de racia kaj praktika majstrado de la ĉiutaga vivo. Li skribas en letero de la 23-a de januaro 1961 al sia okcidentgermana eldonisto, ke li dividas la epikurean mondrigardon de Spinozo kaj Goeto, kiuj rifuzis timon kaj esperon, ĉar ili estas afektoj kiuj endanĝerigas la liberecon de vera homeco.¹⁰⁴ En tio, la pozicio de Lukaĉo estas ankaŭ al la „Principo espero” de Bloch iom distanca.¹⁰⁵ Li preferis, male, paroli pri optimismo rilate al la perspektivo.¹⁰⁶ En tio esprimiĝas ne nur semantika harfendaĵo. Ĝi estas la konvinko, ke oni ne povas esperi socian pliboniĝon nur emocie kaj en tio malracie, sed ke eblas ne nur racie kompreni la sociajn kondiĉojn, sed ankaŭ intervene plibonigi ilin, kaj ke el tio gajneblas optimismo. Pro tio oni ankaŭ apenaŭ trovos ĉe la matura Lukaĉo iun el la ofte cititan devizon de Gramŝo „pesimismo de la spirito, optimismo de la

individuo estas neeskapfeble elmetita, tie oni moviĝas pli proksime al la fremdiĝo – kunsubstanca de la homa estado – de Heidegger-a ekzistadismo ol al la lukaĉa malkovro de la ĝenerala kaŭzo de eblaj novaj fremdiĝoj (eĉ transe de ilia specifa elformiĝo fare de antagonismaj klaskontraŭecoj), kiu estas grava kondiĉo de ilia ebla, efektiva superado.

103 Kp Lukács1986, p. 639.

104 Kp Benseler 1986, p. 731.

105 Lukaĉo komentas la „Kontribuaĵo al la ontologio de la ne-esto” (1961) jene: „Tio estas orname fascina itala salato el subjektivismo, kiu ŝajnis esti objektiva kaj estas de tre malabunda kaj abstrakta objektiveco. Estis al mi nur agrable vidi, ke Bloch tamen ne forlasis sian maldekstran etikon.” (Lukaĉo la 9-an de marto 1961, citita laŭ Benseler 1986, p. 733) Ĉi tie videblas la politika proksimeco kiel ankaŭ la filozofia distanco de la iamaj junec-amikoj: Dum Bloch deduktas sian eŝatologian filozofion el la ebleco kiel ontologia centra kategorio, tiu estas en la lukaĉa *Ontologio* nur modalkategorio subordigita al la centra kategorio realo (kp Lukács1984, p. 161 sj kaj 456 sj).

106 Kp Benseler 1986, p. 731 s.

volo”, kiun tiu pruntis ĉe la franca verkisto Romain Rolland.¹⁰⁷

Ĉu marksisma kredo?

Aliflanke estas logike, ke Uwe-Jens Heuer en sia libro *Marxismus und Glauben (Marksismo kaj kredo)* konsente referencas la teksteron ĉe Gram-ŝo.¹⁰⁸ Sed el la perspektivo de la matura Lukaĉo, Heuer faras pseŭdoservon al la marksismo, kiam li volas kompreni kredon transflanke – pardonu: kompreneble ĉi-flanke¹⁰⁹ – de la kredo je dio kiel nerezigneblan apogon de la marksisma agado.¹¹⁰ Laŭ li, necesas kredo en la marksismo, ĉar „batali,

107 Kp Gramsci 1980, p. 57. Anstataŭ tio, ĉe Lukaĉo montriĝas en tio paraleloj de principa orientiĝo kun la filozofio de Edgar Morin. Tiu ja emfazas unuflanke la kreskantan danĝeron de la – por la unua fojo ebla kaj nur per konscia agado malhelpbla – memdetruo de la homaro, pro tutmondaj detrupovoj: Li nomas speciale la ekologian krizon, la disvastiĝon de amasdetruaj armiloj kaj la multiĝon de militaj konfliktoj kiel ankaŭ la mankon de reguligita ekonomio. Al tio li tamen aliflanke kontraŭmetas, ĝuste vide al tiu danĝero, la ankaŭ kreskantan eblecon de necesa, konscia homa „metamorfozo”, ebla pro la reala kunkreskiĝo de la homa samsorta komunumo (kp Morin 2007). Aparte de tio, ekzistas konsiderindaj diferencoj en la soci-analizo kaj en la konkludoj inter la du filozofoj.

108 Kp Heuer 2006, p. 295.

109 Grava manko de la traktaĵo de Heuer rezultas el la mankanta distingo inter (religia) kredo orientita al transflanka transcendo kaj kredo direktita al ĉi-flankaj faktoj (de la ĉiutaga vivo). Lukaĉo siavice faras tiun distingon sekvante en tio Kantion (Lukács1963a, p. 115 sj). La ĉiutaga kredo estas, laŭ li, ĉe Kantio menciata kiel „opiniado”. Ĝi estas karakterizita per principa malfermiteco al ekkono kaj pro tio karakterizeblas kiel (distordita, ankoraŭ neperfekta) antaŭformo de sciado (kp Lukács1963a, p. 126). La religia kredo je transcendo, kies karakteriza trajto estas ĝuste la principa neekkoneblo (kp Lukács1963a, p. 118), troviĝas, male, en strikta kontraŭeco al la scio, ĉar ĝi pro faktaj kialoj ne kapablas leviĝi al la scio (Kantio) aŭ – ĉi tie Lukaĉo paŝas trans Kantion – tiu leviĝo estas subjektive ne volata. La religia kredo pretendas domini la sciadon kaj ekkonadon – kaj per tio lastinstance ankaŭ la racion –, ĉar ĝi prezentigas kiel pli alta formo de majstrado de la (esenca) realo. En tio, ankaŭ la dogmo en la religio estas esprimo de ĝia vigleco, dum ĝi en filozofio kaj scienco estas degenero (kp Lukács1963a, p. 122 sj).

110 Jan Rehmann, en la *Historisch-Kritisches Wörterbuch des Marxismus (Histo-*

agi kaj des pli la risko de la vivo okazas ne surbaze de scienca kompreno, sed surbaze de interna konvinko.¹¹¹ Kontraŭ „unuflankaj taksadoj de Lenino” li klopodas ĉe tio „iel savi la honoron” de Kantio kaj Fiŝto.¹¹² Precipe ilia emfazo de la konscienco¹¹³ faras por Heuer tiujn du klasikajn filozofojn de la germana idealismo gravaj rilatpunktoj por la renovigo de marksisma etiko.

Tamen rezultas mirige, ke Heuer referencas apud Gramŝo kaj Bloch

ria-kritika vortaro de la marksismo) simile klopodas por kredo, kiun oni devas, laŭ li, kiel vivnecesas resurson elpreni el ĝia religia formo (kp Rehmann 2001). Laŭ li, la ateisma pretendo anstataŭigi la religion per scienca mondrigardo, montriĝis raciisma iluzio. Li analizas la religio(j)n kiel batalkampon de kontraŭaj tendencoj, laŭ ideologi-analizo en la tradicia linio de Gramŝo, Althusser kaj Mariátegui. Necesas akiri la subfosajn-kritikajn elementojn el la religioj por plurala kontraŭsubjekto (kp ankaŭ Rehmann 2002). Ankaŭ la franca-brazila religi-socioologo Michael Löwy emfazas la ligan al la ribela elemento en religiaj pensofluo, kiel aktuale ĉe la liberiga teologio en Latinameriko (kp Löwy 1998, vd ankaŭ Löwy 2006). Laŭ li, la marksisma kritikisto de la varfetiĉo trovas sian ekvivalenton en la batalo de la teologio de liberigo kontraŭ la mortiga idoladoro de la merkato, ĉe kio al ambaŭ komuna estas la moralo kontraŭ la aĝigo, la profeta ribelo kaj antaŭ ĉio la solidaro de la malriĉuloj kaj subprematoj kontraŭ la fremdigo. Ĉar Löwy metas sin en la tradicion de revolucia romantikismo de la juna Lukaĉo aŭ en tiun de Bloch, kiu celas transdoni la utopiajn esper-trezorojn de la religioj en ateisman mesiismon, ne mirigas ke li, kune kun la franca iama june vigla prezidant-kandidato de la francaj trockistoj (LCR) Olivier Besancenot serĉis inspiron ĉe la latinamerika gevarismo [laŭ Ernesto Ĉe Gevara] (kp Besancenot, Löwy 2007). Lukaĉo analizas en sia *Ontologio* multrilate la ribelajn elementojn, kiuj en la religioj direktiĝas al la vera „speciĉo por si”, speciale en sektoj kaj herezaj movadoj – kvankam li taksas skeptike ties religian renovig-kapablon (kp Lukács1986, p. 655), precipe ĉar la eklezioj ĉiam denove pruvis kontraŭ tiuj movadoj altan integrad-kapablon, kiu konservis la ĝisnunan staton (kp Lukács1986, p. 623). Li ankaŭ montris en homa rilato grandan respekton al agnoskindaj religiaj eminentuloj (de Majstro Eckehart ĝis Dietrich Bonhoeffer kaj Simone Weil) kaj ne hezitis – kontraŭ rezistoj en la komunista tendaro – pledi por kunlaborado kun progresemaj teologoj (Barth, Niemöller, francaj laboristopastroj ktp, kp ekz- e Lukács1956). Kvankam Lukaĉo laŭ tio tutcerte engaĝiĝus por politikaj aliancoj kun progresemaj religiaj movadoj kiel la teologio de liberigo, tamen ne povas esti dubo, ke jam lia intereso pri ontologio igus lin pledi por klara

ankaŭ Lukaĉon por sia renovigita pensado pri la rilato de marksismo kaj religio.¹¹⁴ Ekzemple kiam li sugestas, ke ekzistas kontinuec-linio de la novkantia serĉado de „etikaj socialistoj” Max Adler kaj Otto Bauer je „morala aprobo”, kiu povus motivi la batalon por socialismo – trans la ekonomia neceso –, ĝis la lukaĉa etiko, kiu turnas sin al la respondec-konscio kaj al la konscienco de la unuopulo, je kiu la (marksisma) soci-filozofio ne povas senŝarĝigi lin.¹¹⁵

Estas vere, ke ja troveblas punktoj ĉe la juna Lukaĉo por tia proksimiĝo de la pozicioj, sed fari lin ĝenerale ĉefa atestanto por novkantia fondado de etika kredo por motivi la batalon por la socialismo, tio ne nur silente ignoras la fakton, ke la matura Lukaĉo kritikis siajn fruajn skribaĵojn (speciale tiujn, kiuj dediĉas sin al etiko) kiel „kaptitajn en idealisma-utopia revolucia mesiismo”,¹¹⁶ sed ignoras ankaŭ la plej grandan parton de lia postlasita

mondpercepta disigo (kp ankaŭ Lukács1987, p. 26 kaj 41). Laŭ tiu ontologio, la religia kredo konsiderendas kiel formo de fremdigo, t.e. kiel principe – praktike kiel teorie – superenda malhelpo survoje al emancipiĝo de la homaro, kiu baziĝas sur ekkono de la realo.

111 Kp Heuer 2006, p. 289.

112 Heuer 2006, p. 117.

113 Kp Heuer 2006, p. 306.

114 Kp precipe Heuer 2006, p. 188 s kaj 204 sj.

115 Kp Heuer 2006, p. 289 s.

116 Kp Lukács1968b, p. 17. Post kiam la *Heidelberga estetiko* (orig.: *Heidelberger Ästhetik*) (Lukács1975) estis ankoraŭ novkantie stampita (kp Dannemann 1997, p. 14) kaj en la jaro 1916 estiĝis *La teorio de la romano* (orig.: *Die Theorie des Romans*, Lukács1971) „ankoraŭ en la stato de ĝenerala malespero” vide al la 1-a mondmilitoj, kaj „la estonteco en ĝi aperis fihtece kiel stato de perfekta pekeco” (kp Lukács1968b, p. 17), lia eseo *Taktiko kaj etiko* (orig.: *Taktik und Ethik* [Lukács 1968a, p. 43 sj]), aperinta en la jaro 1919, esprimis lian personan transiron de la milite stampita senespereco al idealisma-mesieca entuziasmo vide al la rusa revolucio. Tamen ankaŭ tiu transira fazo en liaj „lernojaroj de marksismo” daŭris nur mallonge, ĉar li i.a. jam en la recenzo *La nova eldono de la leteroj de Lasalo* (orig.: *Die neue Ausgabe von Lassalles Briefen*) de 1925 (Lukács1968a, p. 612 sj) reduktas sian socikritikon al „pli konkreta ekonomia bazo” kaj sur kiu li kritikas la fihtecan subjektivan idealismon ĉe Lasalo. En ĝi Lukaĉo emfazas, laŭ propra takso (Lukács1968b, p. 36 s), ke la filozofia referenco de Fihto ĉe Lasalo estas „ankrita en pure idealisma ĉiomrigardo al la mondo”, kiu en iluzia radikaleco malaprezas la „ĉi-flankecon”. Tiu recenzo

heredaĵo.

Ĉe unu flanko Lukaĉo rifuzas plurfoje kaj eksplicite la novkantiismon, ekz-e en la kritiko de la pozicioj de kelkaj reprezentantoj de la marburga skolo (ekz-e Hermann Cohen kaj Paul Natorp)¹¹⁷ kiel ankaŭ en la kadro de la diskuto kun Nicolai Hartmann, kiu rompis kun la marburga skolo kaj rezignis pri sia pozicio de „princido” tie favore al sia dediĉo al la ontologio.¹¹⁸ Same eksplicite li kritikis la pensofluojn ĉirkaŭ Bernstein kaj la aŭstromarksistoj Otto Bauer kaj Max Adler,¹¹⁹ kiuj – plej ofte dislimante sin kontraŭ la reganta meĥanisma absolutigo de la neceso de la ekonomiaj devigoj, ekz-e ĉe Kaŭcko aŭ Pleĥanov – aspiris „kompletigi” la marksismon per la filozofio de Kantio kaj ĉe tio, laŭ la juĝo de Lukaĉo, burĝe-ekkonteorie memstariĝis.¹²⁰

Dum la meĥanika materiismo (sed ankaŭ ekz-e la ideo de antaŭdestineco) submetas la tutan eston al absoluta, homogena neceso, la kantia akra dudivido en puran naturekkonon kaj puran moralon entenas nesurponteblan duismon de la mondo.¹²¹ Ĉe tio, tiu kompleta disigo de la regnoj de teoria kaj praktika racio implicas ankaŭ necesan idealisman bazon kaj per tio malfermas vastan kampon por la (religia) kredo, sur kiu multspecaj formoj de subjektiva volismo povas kreski.

Ekkonteoria protekto por la religio

La kantia filozofio distingiĝas krome per la ŝanĝo al memstarigo de la

estas, laŭ li, samtempe teoria polemiko kontraŭ burĝigaj – kaj do kontraŭ Markso direktitaj – tendencoj en la tiama socialdemokrata partio. Do, jam en la jaro 1925 Lukaĉo kritikis subjektivism-an-idealisman volismon, kiun li en la Ontologio analizas klare kiel novkantie-etike orientitan ekvivalenton (ekz-e en la Marburga Skolo) al ekstera realo dominata de (absoluta) neceso, tia, kia ĝi esprimiĝas ekz-e en la neces-fetiĉo de la „fera salajroleĝo” (kp Lukács 1984, p. 148 sj). [Pri la „fera salajroleĝo” de Lasalo vd ankaŭ Karlo Markso: Kritiko de la gotaa programo [Librofina listo n-ro 13], p. 32 s. -vl]

117 Kp Lukács 1984, p. 147.

118 Kp saml., p. 422.

119 Kp saml., p. 574.

120 Kp saml., p. 74 s.

121 Kp saml., p. 328.

ekkonteorio, metodologio kaj logiko, kiu en la novpozitivismo kaj en la analiza filozofio trovas sian plej puran elformiĝon kaj konsistigas la kernon de la ideologia disputo en la filozofio de nia epoko.¹²² Lukaĉo vidas la ekkonteorian mision de la ekkonteorio, kiu de Kantio akiris antaŭrangecon en la filozofio, en la ideologia certigo de la hegemonio de la natursciencoj – en la senco de senskrupula scienca disvolvado kiel esenca kondiĉo de kapitalisma ekspansio – ĉe samtempa konservado de la ideologia agospaco por religia ontologio, kiu estas socie bezonata por certigi la dominadon.¹²³ Ĝia plej pura elformiĝo en la novpozitivismo – kaj ĉi tie tiu renkontiĝas kun la ekzistadismo – klimaksas en la rifuzo de la „metafizika” demando de la realo. Spite al rapidega progreso de la scienca-teĥnika dominado de la naturo, la novpozitivismo tiel, per ontologia abstinado, certigas al la religio honoran lokon pri la regulado de la socia kunvivado de la homoj.

La filozofio liveras kun la evakuado de la ontologia demando pri la realo la ideologian protekton por la postulo de la katolika eklezio – ekde Bellarmin ĉiam denove (siampe kontraŭ Galilejo kaj Ĝordano Bruno) farita – je agnosko de duobla vero, kiu limigas la scienccon al la praktika esplorado de la mondo de fenomenoj, kaj lasas la pensadon pri la esenco de la mondo kaj de la homo al la religio.¹²⁴ La marksisma mondpercepto, direktita al socia emancipiĝo kaj per tio al la superado de ekspluatado kaj fremdiĝo, faru do, sur filozofia tereno, la batalon kontraŭ la hegemonio de la ekkonteorio, kiu havas lastinstance funkcion certigi la klasan dominadon.

122 Al la prezento kaj filozofihistoria evoluo de tiu konflikto en la nuntempa filozofio dediĉas sin granda parto de la unua volumode la *Ontologio*, kiu ĉi tie kompreneble nur aludeblas en siaj bazaj trajtoj kaj ĉefe en rilato al la konsekvencoj por la religia bezono (kp Lukács1984, p. 398 sj). Tradicie la ekkonteorio ludis nur subordigitan rolon kaj kiel kompletigo al la ontologio, kies celo estis la ekkono de la realo en si kaj kies kriterio de vero estis pro tio la kongruo de la ekkono kun ĝia objekto (kp Lukács1984, p. 355 s). Al la ekkonteorio, kiu kun Kantio fariĝis memstara, oni ankaŭ en la aktuala scienc-teorio atribuas paradigman gravecon en la scienca realismo – sub la nocio de „epistemic bias” resp. „epistemic fallacy” –, ĉe kio Bhaskar laŭspuras la ekkonteorian distordon eĉ ĝis la antaŭsokratulo Parmenido (kp Bhaskar 1997, p. 36 kaj 44 s).

123 Kp Lukács1984, p. 7 s.

124 Kp Lukács1984, p. 533.

Etika renovigo de la marksismo

Heuer kun sia intenco de etika fondado, speciale antaŭ la realsocialisma sperta fono, havas ja decidan dimension ĉe la renovado de la marksismo. Kaj li pravas, kiam li volas atribui centran spacon al la unuopulo, ligitan kun nocioj kiel „konscienco”, „karaktera firmeco” kaj „forto por kontraŭdiro”.¹²⁵ Sed li klare eraras en sia provo solvi al problemon per rehonorigado de marksisma kredo kun referenco al Kantio kaj Fiŝto. Kun Lukaĉo kaj lige kun Markso, al tio kontraŭmetebblas ontologio de superado

125 Kp Heuer 2006, p. 306. Pro tio oni devas ja konsenti al Heuer, kiam li konstatas: „Esti marksisto, estas ne nur la elekto de teorio, sed samtempe la elekto de sinteno. En tio la marksismo turnas sin al la unuopulo.” (Heuer 2006, p. 306) La okupado de la kampo de etika senĉendonado fariĝas eĉ pli urĝa kompare kun tempo, en kiu Lukaĉo vidis la religion kaj speciale la katolikan eklezion dum la dua vatikana koncilio ankoraŭ en la defensivo kaj en kiu la ideologiaj bataloj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj pri la demando, ĉu morala vivo etas harmonigebla kun senreligieco aŭ eĉ kun ateismo, ŝajnis aparteni al la pasinteco (kp Lukács 1986, p. 614). Antaŭ la fono de la (provizora) triumfo super la (marksisma) materiismo konstateblas tipa, kiel Lukaĉo direblus (kp Lukács 1963b, p. 710), kresko de graveco de la religieco kiel reago al la akriĝo de la kriza mondsituacio. La papo Benedikto la 16-a vidas sian mision en tio, kompensi perdon de ideologia tereno per konservativa ofensivo, kiu postulas kun la universala pretendo je vero de la kredo lastanalize la subordigon de la racio sub la kredon (kp Holz 2007, vd ankaŭ Hoping, Tüćk 2005). La argumento de la papo estas, ke sen religia bazo nenia morala agado pravigeblas (kp Papst Benedikt XVI, 12.09.2006 kaj 2007), ĉar transceno-orfa racio fariĝas, laŭ li, „freneza” kaj kondukus al Aŭŝvico kaj en la Gulagon (kp Tincq 2007, vd ankaŭ. Wenzel, Flasch 2007). La batalo por ideologia dominado nuntempe esprimiĝas aparte en la mondvasta disvastiĝo de la novkreismo, speciale en la formo de la koncepto de „intelligent design”, tiel ke ankaŭ la Eŭropa Konsilantaro avertas kontraŭ ĝia enpenetro en sciencon kaj eduksistemon (kp Le Bars 2007). Eĉ en Francio kun tre elformita tradicio de disigo de eklezio kaj ŝtato, la ŝtatprezidinto Nicolas Sarkozy siatempe usonigis la komprenon de laikeco, per tio ke li anstataŭigis la tradician celon liberigi la publikan spacon el ĉia religia kuratoreco per publika subtenado de religia praktikado (kp Vernet 2007) – kaj pravigis tion, tute en la senco de la papo, per la aserto, ke sen religia bazo, moralo ne fareblas (kp Quiniou 2007). Kontraŭ tiu ŝtate apogata antaŭeniĝo de malraciismo urĝe necesas referenco al renovigitaj marksismaj filozofio kaj etiko.

de la „metafizika antinomio de libereco kaj neceso en la homa agado”,¹²⁶ kiu, deduktanta la specifecon de la socia esto el la analizo de la renkontiĝo de teleologio kaj kaŭzeco en la laboro,¹²⁷ povas fondi marksisman subjektteorion. Lia *Ontologio de la socia esto* metas la materiisman fundamenton de renovigita unueca mondpercepto, sur kiu konstrueblas etiko direktita al superado de fremdiĝo per homa emancipiĝo, orientita al racia ekkono de la realo ĉi-flanke de religio kaj kredo.

126 Kp Lukács1984, p. 328. Sed Lukaĉo indikas, ke sub Stalino la marksismo – paralele al la burĝa novpozitivismo kun ĝia filozofia pravigo de ĉiaflanka manipulado – estis ankaŭ „ree misformita al neorganika miksaĵo de meĥanika neceso kaj volismo (kruda manipulado)” (kp Lukács1986, p. 548). La ontologia renovigo de la marksismo pro tio devas trudiĝi kontraŭ la novkantiaj-novpozitivismaj influoj de la forŝovado de la dialektiko en la Okcidento same kiel ankaŭ kontraŭ la taktika sanktigo por pravigi volisman manipuladon en la Oriento (Lukács1984, p. 111 s).

127 Kp Lukács1986, p. 7 sj.

Literaturo

- Louis Althusser, Étienne Balibar (1972): Das Kapital lesen. Aus d. Franz. v. Klaus-Dieter Thieme. 2 vol., Reinbek ĉe Hamburgo
- Elmar Altvater, Birgit Mahnkopf (2002): Globalisierung der Unsicherheit. Arbeit im Schatten, schmutziges Geld und informelle Politik, Münster
- Frank Benseler (1986): Nachwort des Herausgebers [Postparolo de la eldoninto]. En: Georg Lukács: Zur Ontologie des gesellschaftlichen Seins. 2. Halbband. Zur Ontologie des gesellschaftlichen Seins. Zweiter Teil. Eld. de Frank Benseler, Darmstadt, Neuwied (Werke 14). 731-753.
- Frank Benseler (1995): Der späte Lukács und die subjektive Wende im Marxismus. Zur 'Ontologie des gesellschaftlichen Seins' [La malfrua Lukaĉo kaj la subjektiva ŝanĝo en la marksismo. Pri la 'Ontologio de la socia esto']. En: Rüdiger Dannemann, Werner Jung (eld.): Objektive Möglichkeit. Beiträge zu Georg Lukács 'Zur Ontologie des gesellschaftlichen Seins', Frank Benseler zum 65. Geburtstag, Opladen. 127-146.
- Olivier Besancenot, Michael Löwy (2007): Che Guevara, une braise qui brûle encore [Ĉe Gevara, braĝo kiu ankoraŭ brulas], Parizo.
- Roy Bhaskar (1997): A realist theory of science [Realisma scienc-teorio], Londono.
- Ernst Bloch (1961): Philosophische Grundfragen 1. Zur Ontologie des Noch-Nicht-Seins [Filozofiaj bazaj demandoj 1. Kontribuajo al la ontologio de la ankoraŭ-ne-esto], Frankfurtur.
- Manfred Buhr, Georg Klaus (eld.) (1975): Philosophisches Wörterbuch [Filozofia vortaro], 11-a eld., 2 volumoj, Lepsiko.
- Rüdiger Dannemann (1997): Georg Lukács zur Einführung [Enkonduke al Georgo Lukaĉo], Hamburgo.
- Rüdiger Dannemann, Werner Jung (eld.) (1995): Objektive Möglichkeit. Beiträge zu Georg Lukács 'Zur Ontologie des gesellschaftlichen Seins'. Frank Benseler zum 65. Geburtstag [Objektiva ebleco. Kontribuajoj al Georgo Lukaĉo 'Kontribuajo al la ontologio de la socia esto' Al Frank Benseler okaze de lia 65-a naskiĝtago], Opladen.
- Dietrich Dörner (2002): Die Logik des Mißlingens. Stretegisches Denken in komplexen Situationen. 15. Aufl. [La logiko de malsukceso. Strategia pensado en kompleksaj situacioj. 15-a eld.], Reinbek ĉe Hamburgo (rororo-Sachbuch 19314).
- François Emmanuel (2000): Der Wert des Menschen. Roman. Übersetzt von Leopold Federmair [La valoro de la homo. Romano. Tradukita de Leopold

Federmair], Munkeno.

István Eörsi (1981): Das Recht des letzten Wortes. Einführung [La rajto je la lasta vorto. Enkonduko]. En: Georg Lukács: Gelebtes Denken. Eine Autobiographie im Dialog [Georgo Lukaĉo: Vivata pensado. Membiografio en dialogo] (1971), red. István Eörsi; el la hungara de Hans-Henning Paetzke. Eld. de István Eörsi, Frankfurto ĉe Majno. 7-34.

István Eörsi (2005): Gelebtes Denken. G. Lukács im Gespräch über sein Leben [Vivata pensado. G. Lukaĉo en dialogo pri sia vivo]. [1969-71], en: Georg Lukács: Autobiographische Texte und Gespräche [Georgo Lukaĉo: Membiografiaj tekstoj kaj interparoladoj], eld. de Frank Benseler kaj Werner Jung, Bielefeld (Werke 18), 49-223.

Éric Fassin (2007): Sarkozy, ou l'art de la confusion [Sarkozy, aŭ la arto konfuzi], en: *Le Monde* de 2007-04-13.

Ferenc Fehér (1994): Lehrmeister Lukács. Anfang und Ende des 'grossen Narrativs' [Instrua majstro Lukaĉo. Komenco kaj fino de la 'granda rakonto'] en: Frankfurter Rundschau, eld. 289 de 1994-12-13.

Ferenc Fehér, Agnes Heller, György Márkus, Mihály Vajda (1986a): Aufzeichnungen für Genossen Lukács zur 'Ontologie' [Notoj por kamarado Lukaĉo pri la 'Ontologio'] (1968-1969), en: Rüdiger Dannemann (eld.): Georg Lukács – Jenseits der Polemiken [Georgo Lukaĉo – trans la polemikaĵoj], Frankfurto ĉe Majno. 232-253.

Ferenc Fehér, Agnes Heller, György Márkus, Mihály Vajda (1986b): Einführung zu den „Aufzeichnungen für Genossen Lukács zur 'Ontologie'“ [Enkonduko al la „Notoj por kamarado Lukaĉo pri la 'Ontologio'“], en: Rüdiger Dannemann (eld.): Georg Lukács – Jenseits der Polemiken [Georgo Lukaĉo – trans la polemikaĵoj], Frankfurto ĉe Majno. 209-231.

